

2^o JARO.

CENIO

N^{ro} 11^a

TRA LA MONDO.

· TVTMONDA · ILVSTRATA · REVUO · ESPERANTISTA ·

MAJO
1907.



GENERALA PLANO KAJ ENHAVO.



ĈIULANDA VIVADO : Internacia enketo pri edukado. — Raporto de P^{ro} *Th. Rousseau* laŭ dokumentoj de F^{inoj} *Monster, Funck, Miller, Toersom* (DANUJO), S^{roj} *Seenbuch* (JAPANUJO), *Samppa Luoma* (FINNLANDO).

SCIENCJOJ : Scienca kroniko, de *Marcel Finot*.

MILITISTARO KAJ MARISTARO : Eltiraĵoj el « Tra Mez-Afriko », de *K^{to} Lemaire* (BELGUJO).

DIVERSAĴOJ : Interŝanĝoj de infanoj, de *C. Barthel* (GERMANUJO).

KOMERCO KAJ INDUSTRIO : La Rochelle, de *Sam. Meyer* (FRANCUJO).

SPORTOJ : La Peloto, de *J. Mattes* (HISPANUJO).

TRA LA MONDO : Edinburgh, de *W. M. Page* (SKOTLANDO).

PRI ESPERANTO : Esperanto ĉe la Junularo. — Kroniko. — Bibliografio.

TEATRO : Annama teatro, de *J. Contencin*. — La Opero de Monte-Carlo en Berlin, de *E. Bacquet*. — Salome, de *R. Strauss*, en Paris.

VIRINA PAĜO : La Modo, de *Roksano*.

FELIETONO : La specialistoj, de *J. H. Salomon* (HOLANDUJO).

LITERATURA ALDONO.

Oranĝujaj floroj, de F^{ino} *O. Prudent* (FRANCUJO). — Naiveco, de *Coelho Netto* kaj *Daltro Santos* (BRAZILUJO). — Guteton da lakto! de *A. Agaronjan* kaj *G. Davidov* (ARMENIO). — La Ora Ŝosileto, de F^{ino} *E. Gunzbourg* (FLANDRO).



CAROLINE
1907. OXFORD, E.V.

UNU NUMERO : 75 CENTIMOJ.

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj, devas esti sendataj al S^o Brunet, 9, Cours V. Hugo, Bordeaux, (Fr.)
Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO, devas esti sendataj al :

Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Jara abono : 8 fr. ĉiulande. (1^a Jaro : 12 fr.) — Duona : 4.50 fr. — Kvarona : 2.25 fr. — Unu kajero : 75 c.

RIPREZENTANTOJ : Brita Imperio : British Esperanto Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London, W. C.
Svedujo : S^o P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

« TRA LA MONDO » estas aĉetebla ponumere ĉe la Librairie de l'Esperanto, kaj EN ĈIUJ FRANCAJ STACIDOMOJ.

POŝTAJ ABONOJ en la jenaj landoj : *Belga, Dana, Franca, Itala, Norvega, Portugala, Sveda, Svisa.*

Kiom forflugas la tempo !

Apenaŭ 2 monatojn ankoraŭ, kaj jam okazos *la Tria*; ankoraŭ 1 kajeron, kaj jam « Tra la Mondo » atingos dujaran ekziston. Kiom rapidege forflugas la tempo !

Kun kontentiĝo kaj iom da fiereco ni povas rigardi maltaŭnen, kaj, sentime, instigi la plej postulemajn, ke ili malfermu, ĉe ia ajn paĝo, iun ajn kajeron de nia dua jaro, same kiel de la unua : neniu havos por plendi.

En sia lasta ĉefartikolo, la redaktoro de « Espero Katolika », faka revuo, kiu — mi ĝin diras pasante — iĝas ĉiunumere pli kaj pli interesa por la katolikoj, skribas, ke « la sukceso de gazeto dependas de : 1. Intereso, 2. Disvastiĝo, 3. Regula apero, 4. Mono ».

Ni kredas ke mankas ĉe « Tra la Mondo » neniu el la 3 unuaj kondiĉoj. La unua estas, ja, konsekvenco de la dua kaj ankaŭ de la estimo akirita de la gazeto.

Senhalte, kiel povis konstati niaj legantoj, alvenas al ni novaj ŝatindaj kunlaborantoj el novaj landoj, kiel eble plej malproksimaj per la distanco, la lingvo, la karaktero. La lastan jaron ni enpresis artikolojn pri 25 landoj, de 20 malsamlingvuloj. Tiun ĉi jaron la nombroj kreskis ĝis 33 kaj 28. Inter la novaj lingvoj, kiujn liveris al ni kunlaborantoj, ni povas citi la flandran, japanan, provencan, portugalan, armenian, ukrainan (en la venonta numero).

La diverseco de la rubrikoj egalas tiun de la landoj kaj lingvoj reprezentitaj; du novaj estas kreitaj : *Sportoj* kaj *Scienca Kroniko*.

Fine multekostaj ilustraĵoj pligrandigas la allogon de « Tra la Mondo ». Ni do faris tion, kion ĝis nun faris nenia alia Esperanta gazeto.

Niaj legantoj konscias pri tio, kaj ni ĝojas vidante l' amikecon, eĉ l' amemon, de la plimulto el ili al sia gazeto kaj ĝia direktoro; kun kia plezuro ni legas la leterojn parolantajn pri nia gazeto, nia ŝatata familia revuo, *nia* « Ilustrato ».

Tiuj, kiuj tiel skribas, vidas la celon al kiu ni iras : post du jaroj da senĉesa kaj nura propagando, kies rezultatoj ne samniveleĝas kun la klopodoj, ĉar tro da ili estas perditaj, ni volis doni al ĝi formon pli konkretan, *kin restos*, kreante gazeton liverontan al ĉiuj, kiuj scios ĝin utiligi, nekontraŭstareblajn argumentojn ; kaj tio per unu sola numero.

Al la virinoj, oni montru la kronikojn de nia sprita Roksano kaj la ĉarmajn elektitajn modelojn ; — al la gejunuloj, la paĝojn speciale dediĉitajn al ili, niajn komedietojn ; montru al ili ke « Tra la Mondo » interrilatigos ilin kun ĉiulandaj gejunuloj (la letero de Falun, en ĉi tiu numero, ĝin pravas mirinde) ; — al la Sportistoj, la artikolojn de nia agema kunlaboranto, L. de Gruensnot ; — la scienculoj mem povas legi interese la sciencajn artikolojn de nia distinga kunlaboranto M. Finot, kvankam ili estas speciale verkitaj por la nemetiistoj.

Tiom kiom eble ni sekvas la nunecon per artikoloj ĉiam interesaj, ofte emociaj, ĉar ili estas verkitaj de ĉeestintoj (ni rememorigu nur tiun pri la eksplodo de « L'Éna » de marleŭtenanto Fahrner).

La art- kaj literaturamuloj trovas ĉe « Tra la Mondo » ŝtufon indan ilin interesi ; sufiĉas aludi la ĵus aperintajn artikolojn pri « Le Stabat » de Rossini, de nia klera kunlaboranto E. Bacquet ; pri « Vereschagin », de N. Kabanov ; pri Carducci, de E. Meazzini ; pri Berthelot, fama scienculo sed ankaŭ ano de la Franca Akademio, k. t. p.....

Kiam aperas novaj gravaj literaturaj verkoj Esperantaj, ni penadas recenzi (raporti) ilin sub nova formo, analogia al tiu uzata en la bonaj naciaj gazetoj ; ekz. : la « Literatura kroniko » de P^{ro} Buequet en la 7^a n^o, la recenzoj pri la verkoj de Kabe :

Pola Antologio, de Urso, kaj *Elektitaj verkoj de fratoj Grimm*, de nia amiko P^{ro} Christaller (Germanujo), la lasta en ĉi tiu numero.

Niaj felietonoj montris nian priokupon pri la internacieco : hodiaŭ ni komencas amuzan novelon el la Holanda lingvo ; kaj tre baldaŭ, sendube en la 1^a numero de *la Tria*, ni ekpresos tradukon de la ĉarma komedio « Kapricio » de la mirinda franca poeto **Alfred de Musset**, verkitaj de nia talenta kunlaborantino Johanno Flourens.

Aliaj verkoj pravas ke *la Tria* (jaro) de « Tra la Mondo » volas estis inda je la nomsameco kun *la Tria* (kongreso), kies sukceso estas de nun certa, kaj certe estos multe super tio, kion oni esperas.

Tion scias niaj legantoj, per nia rubriko « Pri Esperanto » en kiu ni penadas konigi, lege kaj *vide*, la ĉefajn okazojn en la mondo esperantista, kaj speciale helpi la organizadon de niaj kongresoj.

Jus hodiaŭ, ni ricevis leteron de la Triano H. Bolingbroke Mudie, sendanta la dankon de *la Trio* « pro la grandaj servoj faritaj al ĝi de *Tra la Mondo* ». Ni rajte fieriĝas pro tia atesto de homoj tiel bonaj juĝoj, ĉar al ilia agemeco estos ŝuldata la sukceso de *la Tria*.

Tiu atesto ne estas ununura, kaj plezure ni vidas ke, pli kaj pli, la ĉiulandaj propagandistoj komprenas kia riĉa minejo el valoraj dokumentoj estas ĉiu numero de « Tra la Mondo ». Ni jam citis kelkajn ekzemplojn en antaŭaj numeroj. Jen tri aliaj, kiuj rilatas pli grandan nombron da landoj.

En « **LE JOURNAL DE BEAUNE** » ekzistas rubriko « Tra la Mondo » en kiu, ĉiunumate, la ĵurnalo promenas siajn legantojn *Tra la Mondo* per simpla analizo de nia monata numero.

Tre interesataj de tiu sagaca propaganda rimedo, la legantoj de la ĵurnalo iom post iom konvinkigas pri la utileco de lingvo kapabla havigi tiajn interesajn sciigojn ; kaj la fruktojn de sia lertece kolektas la elpensemaj propagandistoj, kiam ili trairas la urbojn, kie estas legata la grava regiona **JOURNAL DE BEAUNE** : ili renkontas nur personojn jam esperantemajn ; kaj mirinde kreskas la anaro de la grupoj en Beaune kaj en la najbaraj urboj.

Ni jus ricevis numeron de grava aŭstria ĵurnalo en Wien (Vieno), « **NEUGKEITS-WELT-BLATT** », enhavantan la tradukon de niaj sciigoj pri la oficiala akcepto de Esperanto, de multaj brazilaj ministroj, presitaj en nia 8^a numero.

Fine jen eltiraĵo de « **LA BELGA SONORILO** » (n^o 60), el la grava raporto « Esperanto kaj la Blinduloj », prezentita al Sinjoro la ĝenerala inspektoro de l' bonfaradejoj belgaj, de frato Izidoro, profesoro ĉe la reĝa instituto por surdmutuloj kaj blinduloj en Sta Lambert-Woluwe (Bruselo) :

« Dum 1905, itala esperantisto, S^{ro} Luis Carlos, trapasante Bruselon, vizitis nian lernejon, kaj raportis pri tio en la ĵurnalo « Tra la Mondo ». **Tiu artikolo ne estis senfrukta por nia agado** : S^{ro} Adams, Sekretario de la esperantista grupo de Hastings (Anglujo) tradukante legis tiun raporton al la estraro kaj instruistaro de la « Royal Normal College for the Blind » en Norwood-London, kaj baldaŭ ekfaris kurson al la profesoroj kaj lernantoj de tiu instituto, unu el la plej ĉefaj en la mondo. **Aliaj esperantistoj agis sammaniere**, kaj mi ricevis el Prague (Bohemujo) Riĝo de Janeiro (Brazilujo), Toulouse (Francujo), petojn pro sciigoj pri la enkonduko de Esperanto en la tieajn blindulejojn ».

Do, jen artikolo kiu, laŭ la atesto de frato Izidoro mem,

Premio al niaj legantoj.



Por esti agrabla por niaj legantoj kaj samideanoj, ni klopodadis kaj faris interkonsenton ebligantan liverigi, *hejmen* kaj sen transportkosto en ĉiun Eŭropan landon krom Rusujo (Transmare kaj Rusuje, eksteren transporto kaj limdepago plue), je la malgranda prezo montrata ĉi sube, la precizegan poŝhorlogon L'ESPERO, kiu eliras el unu el la plej bonaj svisaj fabrikejoj, kaj kies ujo, el blanka metalo oksidita kvazaŭ malnova arĝento, estas fotografe montrata ĉi apude (ĝustagrande).

En la du kvalitatoj, la poŝhorlogo estas plene garantiata, bonege reguligita, radaro je ankro perfektigita, eleganta formo. La sendo estas farata kontraŭ poŝta repago aŭ antaŭa pago, laŭ peto sendita al la administracio de « Tra la Mondo ».

Unua kvalitato: 30 fr. Dua kvalitato: 20 fr. Por Rusujo, aldoni 5 fr. por la transporto kaj limdepago.
Por U. Ŝ. de A., aldoni 10 fr. por la limdepago. Antaŭa pago estas *necesega*.

helpis la propagandon de tiuj, kiuj sindone okupiĝas pri la disvastigo de Esperanto ĉe la blinduloj en 5 landoj; aparte ĝi sola estis temo de raporto ĉe la grava instituto por blinduloj en Anglujo; sendube, en aliaj landoj, ĝi samefikis, sed mankas nur al ni la sciigoj pri tio, kiel ili mankis pri la agado de frato Izidoro kaj S^o Adams, ĝis kiam ni legis la non aluditan de **BELGA SONORILO**.

Tiuj faktoj instigu niajn legantojn pli kaj pli utiligi, laŭ la cirkonstancojn, la artikolojn de « **TRA LA MONDO** »; la simpla legado de la monata « Generala plano kaj enhavo » montras tuj la profiton akireblan de ĉiu numero.

Helpante tiel sin por sia propagando, tiuj kiuj ĝin faros helpas ankaŭ la disvastiĝon de la gazeto, kaj plirapidigos ĝian dikigiĝon.

Kiel oni povis vidi, tiuj kiam ni havis kelkajn reklamojn, ni duobligis la kovrilon. Konsekvence ni havas spacon por multaj tekstoj esperantistaj, miksaĵoj, kroniko, bibliografio, antaŭe presitaj en la interno de la gazeto; do ni povas enpreni pli da ŝtofo *pure Esperanta*.

Tio ĉi jam pruvas, ke ni ne celas mongajnon. Plue, iafoje ni enpresas aldonojn, kiujn ni intencas igi regulaj. Ju pli da helpo ni ricevos, des pli rapide ni efektivigos nian deziron.

Sed, eble, ne estos senutile rimarkigi ke, jam, « Tra la Mondo », malgraŭ ĝia rilate malgranda nombro da paĝoj, estas tamen unu el la plej ampleksaj el la gazetoj Esperantaj per sia formato, kaj siaj paĝoj presitaj per malgrandaj literoj.

Jen, ekzemple, komparo inter « Tra la Mondo » kaj tri aliaj gravaj gazetoj: « **INTERNACIA SCIENCA REVUO** », « **LINGVO INTERNACIA** » kaj « **LA REVUO** ».

1 paĝo *T. L. M.* (grandaj literoj) = 2¹/₂ p. *I. S. R.* = 4 p. *L. I.* (g. l.) = 2¹/₂ *L. I.* (malg. l.) = 2¹/₂ p. *L. R.*
1 paĝo *T. L. M.* (malg. l.) = 4¹/₂ p. *I. S. R.* = pli ol 7 p. *L. I.* (g. l.) = 4¹/₂ p. *L. I.* (m. l.) = 4¹/₂ p. *L. R.*

Nu, de la antaŭa statistiketo, rezultas ke « Tra la Mondo », kiu ampleksas ne 16 sed ĉiam 20 kaj iafoje 24 paĝojn, enhavas proksimume tiom da ŝtofo ol la diritaj gazetoj, se ne plu; ĝia komposta kaj presa kosto estas do tiom alta; sed oni devas aldoni al ĝi la koston prezon de l' klišaĵoj, kaj tiun de l' speciala papero necesega pro la ilustraĵoj.

Tute malprave, do, kelkaj personoj skribas al ni « ni ne sukcesas varbi abonantojn ĉar la gazeto kostas tro ». Por tiuj amikoj ni donis la jenajn klarigojn, kiuj ebligis por ili kontraŭbatali eraran opinion.

Cetere, ni rememorigas ke, tuj de l' komenco, ni donis rimedojn por pagi la abonon malpli kare ol la plena prezo (Vidu la paĝon 5^{an} de la kovrilo).

En nia estonta numero, ni donos la nomaron de kelkaj el la manuskriptoj, kiuj atendas spacon. Oni ebligis por ili la eliron el la manuskriptaj klasiloj.

La rimedon, donas abato Peltier en la artikolo jam aludita.

« Mono venas per *abonantoj, anoncoj* kaj *monoferoj* ». La lasta fonto ne taŭgas por nepartia gazeto, kaj ni ne bezonas ĝin. Al ni la devo subteni nian fondaĵon; sed ĝin kreskigi apartenas al la legantoj, al kiuj ni ekvidetigas la rimedojn: ili havigu abonantojn kaj anoncojn. Ni konfidas al ili, kiuj povas konfidi al ni.
A. MONTROSIER.

Unua jaro (neplena) de « Tra la Mondo » (10 numeroj) je la FAVORA PREZO 6 fr.

Unua jaro de « Tra la Mondo »: 12 fr. Restas nur kelkaj kolektoj.

BONEGAJ PREMIOJ POR KURSOJ KAJ KONKURSOJ!!

Propagando.

La bela ilustrata angla gazeto « **Pictorial Comedy** » enhavas tutan paĝon dediĉitan al Esperanto, en kiu estas la traduko de ĉiuj desegnoj de la revuo.

Aliparte la humora gazeto « **Seraps** » enhavas ankaŭ, Esperante, la titolojn de l' samaj desegnoj de « **Pictorial Comedy** ». La iniciativo de tiuj gazetoj estas bonega kaj tre taŭga por alvoki la atenton al Esperanto (Esperanto « **Scraps** » Office, Red Lion House. Red Lion-court, Fleetstreet, London, E. C.)

Okazas ofte, ke ni ricevas fremdajn ĵurnalojn sen nomo de sendinto, nek ia ajn montrilo pri la atentinda artikolo. Ni petas ke, kiam oni bonvolas al ni sendi signifan artikolon oni konigu ĝin kaj sin iamaniere.

Nia bonega kunfrato « **La Belga Sonorilo** » publikigas france kaj Esperante, de la N^o 54^a (20^a de Jan. 1907) serion el artikoloj ŝuldataj al la lerta plumo de nia fervora samideano Komandanto Lemaire, kaj aperitaj france en la grava, tutmonde konata « **L'Indépendance Belge** ».

Viglaĵ, amuzaĵ, spritaj, iafoje sciencaj kaj profundaj, ĉiam facilegeblaj, tiuj artikoloj estas tre atentindaj por la propagandistoj, ĉar dank' al sia dulingva eldono, ili povos fari servojn al ĉiulandaj amikoj. Ni atentigas ankaŭ pri la rubriko *Nepre simpleco! Nepre klareco* de « **Belga Sonorilo** ».

CHARLES MENDEL, ÉDITEUR
118, Rue d'Assas, PARIS.

NOVA REVUO DE FOTOGRAFADO

Foto-Revuo Internacia

ĈEFREDAKTORO: CH. VERAX.

— Teksto franca kaj Esperanta. —

La **Foto Revuo Internacia** n'est pas la traduction en Esperanto de la Photo-Revue; c'est une revue indépendante dont les articles sont originaux ou puisés dans les meilleures revues du monde entier.

ABONO: Jare: 5 fr. por ĉiuj landoj.

ILUSTRITAJ POŝKARTOJ PROPAGANDAJ.

kun belaj vidaĵoj eltiritaj de

« **TRA LA MONDO** »

La serio (6 kartoj), afr.: 0 fr. 40 c.

5 serioj (30 k.), afr.: 1 fr. 50 c.

10 serioj (60 k.), afr.: 2 fr. 50 c.

15 serioj (90 k.), afr.: 3 fr. 75 c.

Rekomendo: 0 f. 10 c. aŭ 0 f. 25 c. plue

Pageblaj poŝtmarke aŭ monpapere.



ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genève 1900

Prezo: FRANCEJE. — 11 f 50 la kesto da 2 boteloj. Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ALILANDE. — 4 f ĉiu botelo prenita en S^t Etienne, impostoj kaj transporto plua.

Ĝenerala Tenejo por Francujo kaj Fremdujo
J. B. Brunon-Chauvet
S^t Etienne (France)

LA INTERNACIA TRINKAĴO !
Viskio Esperanto

Registered trade mark N° 270,042. Marque déposée N° 13,195.
Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & C^o

GARTHLAND STREET,
GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto - Glasgow.

Ĉampanvino "Mirinda"

1 fr. 75 kaj 3 fr. 50 ĉiu botelo
por 12 boteloj, minimume, enpakitaj en keston.

Ĉe S^{ro} Ch. JADEAU, MERCUREY (S. & L.) France

SE

vi konas malfacile spiranton (astmemulon), vi faros al li servon konigante la « Remède d'Abyssinie Exhibard » (Abisinia kuracilo EKSIBAR), pudre, cigarede, aŭ je formo de folioj por fumi kvazaŭ tabakon en la pipo. Tiu kuracilo, ordonata de ĉiuj kuracistoj, sensuferigas kaj resanigas milojn da malsanuloj ĉiujare. Sin turni al

Sinjoroj H. Ferré, Blottière et C^{ie},
102, rue de Richelieu, PARIS.

L'Internacia Signo

estas la « **VERDA STELO** » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (per kunmona mendo). Ĉe S^{ro} Emilo Gasse, 105, rue du Lycée, Le Havre (France).

MILKA
VELMA
NOISETTINE

Suchard

LA BONGUSTEGAJ

ĈOKOLADOJ

POR MANMANGI.

Fervojoj de Paris-Lyon-Méditerranée.

ĈIRKAŬAĴO DE PARIS:

Dank' al la ĵusa funkciadigo je du novaj vojoj inter **Villeneuve Saint-Georges** kaj **Brunoy**, la K^{io} P. L. M. havas la eblecon plibonigi grave sian ĉirkaŭurban servadon. Tiuj plibonigaĵoj, utiligeblaj de la 1^a de Majo, estos certe tre ŝatataj. En la ĉirkaŭurbo diservata de tiu K^{io} kuŝas la ĉarmaj lokoj **Montgeron**, **Brunoy**, **Juvlsy**, k. a., la valetoj de **Yerres** kaj la arbaro **Sénart**, la bordoj de la **Haute-Seine (Le Coudray, Seine-Port, k. c. l.)**; **Melun** kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj (kastelo de Vaux-le-Vicomte, abatejo de Dammarie-les-Lys); la palaco de **Fontainebleau** kaj la arbaro, unu el la mirindaĵoj de Francujo.

LA DUDEKJARA JUBILEO DE ESPERANTO.

Favore jam parolis multaj gazetoj pri la projekto de S^{ro} Tabenski: ni citu, inter aliaj, « Lingvo Internacia » nia malnova organo, kiu longe analizis nian antaŭan artikolon; « Das Echo », kiu ĝin tute represis; « Germana Esperantisto » tre favora, k. a. ...

Jen nun eltiraĵoj el kelkaj el la tre multenombraj leteroj ricevitaj de ni kaj de S^{ro} Tabenski.

Francujo, Sens, 14^{an} de Aprilo.

« En sia ĝenerala kunveno, la 12^{an} de Aprilo, la grupo de Sens decidis festi, se eble per ekskurso komuna kun najbaraĵo grupoj, la 20^{an} Jubileon de Esperanto ».

(S^{ro}) R. Deshays, ĝen. sek.

Uruguay, Montevideo, 18-3-07.

... Kion ni faros mi nenion povas jam komuniki al vi; ni pensas ke en tiu ĝojega tago oni devas kun granda bruo festi por atentigi la publikon, kaj tiamaniere ni atingos multe pli bonan sukceson por nia afero. Sekve estas eble ke ni faros tiun feston teatra. Post baldaŭ mi komunikos al vi nian decidon. La Ideo estas bonega, ni devas ĝin utiligi....

(S^{ro}) Gerardo Muinos.

Usono, Los Angeles Cal.

« ... Ni tute konsentas la projekton kaj deziras al ĝi bonan sukceson... »

(S^{ro}) F. J. Stone.

Aŭstralio, Perth W. A.

« ... Mi opinias ke ĝi estas bona ideo, kaj esperas ke esperantistaro faros multe pri ĝi. »

(S^{ro}) H. M. Leighton.

Anglujo, Brighton Hove, 25-3-07.

« ... Festi la 21^{an} de Julio, pensas niaj grupanoj, estas tre bona ideo... »

(Fino) Hon. Sek. E. M. Eklund.

Anglujo, Plymouth, 10-3-07.

« ... Jes mi opinias ke sendube la 21^a de Julio devos esti honorigata per festo; certe, en Plymouth oni faros ĉion eblan... »

(Fino) Lillian Holt.

Argentino, Chacabuco.

« ... Al via aprobinda ideo mi deziras sukceson. »

(S^{ro}) J. M. Olivares.

Francujo, Lyon, 1-3-1907.

« ... Pri via propono de tutmonda festo je la okazo de la dudekjara datreveno de la apero de Esperanto mi opinias ke la ideo estas bonega. »

(S^{ro}) C. Bégel, Sek. Gr. Esp. Lyon.

Francujo, Valence, 6^{an} de marto.

« ... Bonega propono memori per festo la 20^{an} datrevenon de l' apero en la mondo de Esperanto. Ĉi tie oni aprobas tiun projekton... Eble ni faros ekskurson por altiri al Esperanto, la atentecon de niaj samurbanoj. »

(Fino) J. Dugand.

Francujo, Chalon, 3-3-07.

« ... La grupoj esperantistaj de *Chalon-sur-Saone, Burg (Ain) Annecy* (Haute Savoie) aprobas vian bonegan ideon pri la festo okazonta la 21^{an} de Julio. »

(Fino) M. Perny.

Ruslando, (Litovujo) Podbuchtá, 1-4-07.

« ... Ni estas konvinkitaj ke la festo utiligos por nia afero. »

Osip. Adela. Edith. Riĉardo Elleder.

Kelkaj personoj rimarkigas ke, por kelkaj popoloj, ĉe kiuj la Dimanĉo estas tago je nepa ripozo, la dato 21^a de Julio ne taŭgas.

Oni bonvolu kompreni ke la 21^a de Julio estas meza tago rilate la feston, kaj ke oni povas tiel bone ĝin soleni la 20^{an} aŭ la 22^{an}, laŭ la lokaj kutimoj, kiel la 21^{an}. La ĉefa afero estas ke, en 2-3 taga daŭro, eĉ 4-5 taga, ni solenu kiel eble plej multe kaj atentige la memorindan okazintaĵon, kaŭzon de niaj klopodoj kaj de niaj esperoj.

A. MONTROSIER.

LA PLUS LOGIQUE des Méthodes appliquées à
LA PLUS SIMPLE des langues suivant
LES PLUS MODERNES des principes d'enseignement des langues.

Méthode Palmer

Livre de 100 pages: fr. 1.25.

Franco: Belgique, fr. 1.35. — Etranger, fr. 1.50

VERVIERS, Place Verte, 20.



Fot. Steenbuch.

GIMNASTIKO EN KNABINA JAPANA LERNEJO.

Internacia enketo pri Edukado

15 Landoj partoprenintaj.

La unuagradaj lernejoj (fino): la gimnastiko en Danujo, laŭ dokumentoj de Fraŭlinoj G. Mönster, Funck, Miller, Toersom; en Japanujo, de Sinjoro C. Steenbuch. En finnlanda lernejo, de Sinjoro Samppa Luoma. — La duagradaj lernejoj: la monahineja edukado en Polujo, laŭ Sinjorino H. Hulanicka (Polujo).

Oni certe rimarkis, en la jam analizitaj leteroj de niaj korespondantoj, kiel multe la korpna edukado estas nuntempe prizorgata en ĉiuj landoj. Nia samideanino F^{ino} G. Mönster demandis pri tiu temo danan gimnastikinspektoron kaj el lia afabla respondo, tri el ŝiaj lernantinoj F^{inoj} Funck, Miller kaj Toersom bonvolis verki la tre interesan raporton jenan:

« Por la korpna edukado de la infanoj estas uzataj gimnastiko, pilkludo, naĝarto, ludo.

Gimnastiko estas deviga en la ŝtatlernejoj, popolaj lernejoj kaj ĉiuj privataj lernejoj, kiuj havas ekzamenan rajton.

En la lernejoj estas donataj ĉiusemajne 2 aŭ 3 gimnastik-lecionojn (al la ekzamenaj klasoj 4), kiuj en la urbaj lernejoj okazas en la lernada tempo, kaj en la vilaĝaj lernejoj ekster la lernada tempo. Ordinare la knaboj kaj knabinoj ne gimnastikas kune.

Ĉiuj lernantoj devas partopreni en la gimnastik-lecionoj, kaj estas liberigitaj de ili nur per kuracista atesto. Ĉiuj lernejoj en preskaŭ ĉiuj urboj havas gimnastikejon. En la kamparo, manko de fermitaj gimnastikejoj malhelpas la progresadon de la gimnastika instruado por la knaboj, kiel ankaŭ por la knabinoj, por kiuj ĝi ne estas jam deviga, escepte en la prepara lernejo.

La 3500 vilaĝaj lernejoj havis en 1904^a nur 387 gimnastikejojn; sed la pligrandiĝanta scio pri la graveco de la gimnastiko por korpna kaj animo, kaj ankaŭ monhelpoj, jare pligrandigas ilian nombron. En 1904^a estis 53 gimnastikejoj plie, ol en 1902^a.

En diversaj vilaĝoj estas kunvendomoj, kiuj apartenas al privataj societoj, kaj kiuj ofte estas uzataj de la lernejoj. Ĉe ĉiuj vilaĝaj lernejoj estas loko por gimnastiko kaj ludo kun la plej ne-

cesaj iloj por la ekzercoj; ĝi estas uzata dum bela vetero, tamen nur de la knaboj; sur la kamparo la knabinoj ne ofte partoprenas en la gimnastiko.

Laŭ leĝo de 1904^a, gimnastiko fariĝis parto de ekzameno por la 15-16-jaraj lernantoj kaj ĝi ankaŭ estas enigata en gimnazian ekzamenon (18-19-jaraj lernantoj).

La instruado pri lerneja gimnastiko (knaboj kaj knabinoj) estas tiel farata: kiam eksonas la sonorilo, la infanoj kuniĝas por ŝanĝi siajn vestojn, antaŭ ol ili eniros en la gimnastikejon. Post la preparaj ekzercoj, kiujn la instruisto mem komandas, la lernantoj estas dividataj en grupojn, kaj ĉiu grupo estas komandata de lernanto, kiu havas la privilegiojn kaj la respondeblecon de instruisto. Tiel dividante la lernantojn, oni gajnas ke granda nombro da infanoj povas labori en la sama tempo. Kaj multe da ekzercoj povas esti farataj. Tiu ĉi procedo preparas la infanojn al sociala vivado, kaj pligrandigas ilian energion. Kiam ili estas sufiĉe laborintaj grupe, la instruisto reprenas la komandantecon por ludo aŭ finaj ekzercoj.

Dum bela vetero la infanoj havas la permeson gimnastiki, ludi kaj pilkludi sur la ludplaco. Lernejoj proksimaj al grandaj kampoj sendas tien la lernantojn. Lernejoj proksimaj al maro, sendas ilin tien por bano; kompreneble, ili estas akompanataj de sia gimnastikinstruisto. La preparaj ekzercoj por naĝado estas farataj dum vintro en la gimnastikejo.

En la lernolibro, eldonita de la ministrejanaro (lernolibro pri gimnastiko por la lernejoj; 1905^a) oni trovas la ekzercojn, ludojn kaj pilkludojn kiuj ordinare estas uzataj en la lernejoj, kaj la instruisto starigas sian leciontabelon laŭ tiuj ĉi ekzercoj kaj

la ecoj de la infanoj, tiel ke la infano en ĉiu gimnastikleciono faru la plej utilajn movojn. La lernolibro estas verkita laŭ la principoj de la sistemo de Lind (P. Lind estas la fondinto kaj la unua direktoro de la centra instituto en Stokholmo).

La instruado al gimnastikeinstruistoj estas donata en:

a/ Gimnastikkurso de la popola akademio de la Ŝtato, fondita en 1898^a. La lernkurso estas unujara kaj finiĝas per publika ekzameno pri gimnastiko teoria kaj praktika: anatomio, ludoj kaj pilkludoj, kaj instruado.

La lernkurso estas ĉefe vizitadata de geinstruistoj, kiuj tie ricevas la lastan finan instruadon. Proksimume 35 personoj estas jare instruataj. La plimulto el la lernantoj estas ankaŭ ekzamenataj pri naĝarto.

b/ La seminarioj. — Tie la gimnastiko estas instruata, kun aliaj instrufakoj, teorie kaj praktike.

c/ Mallongaj kursoj. En kelkaj popolaj akademioj estas ĉiusomere mallongaj kursoj, pagataj de la Ŝtato, parte ripetkursoj por gimnastikinstruistoj kaj instruistinoj, parte elementaj kursoj el la alta instruado de la suprenomitaj lokoj. Ĉefe tiuj lernantoj de la popolaj akademioj, kiuj direktas la memvolan gimnastikon en siaj paroĥoj, estas instruataj en tiuj ĉi kursoj.

En kelkaj popolaj akademioj estas fonditaj sekcioj por la instruado de geinstruistoj, kiuj devos direkti la gimnastikon de la gejunuloj de siaj paroĥoj.

La ĉefdirekcio de la paŝtaj societoj havas, de 1889^a, kursojn por instruado de gimnastikinstruistoj. Ĉiuj ĉi estas vizitadataj de kamparanoj, kaj daŭras 4 semajnojn. La junaj viroj estas plej ofte malnovaj lernantoj de popolaj akademioj. La nombro de la anoj estas nun 18.000.

Por kontroli kaj gvidi la gimnastikinstruadon de la lando, la Ŝtato elektis gimnastikinspektoron kaj du helpantojn, kiuj trairas la landon por observi la instruadon, kaj kunvenigas instruistojn kaj aliajn personojn kiuj interesas sin pri gimnastiko.

Sperto montras ke tiu ĉi organizacio tre taŭgas kaj ĉie estas ŝatata de la instruistoj kaj de la lernantoj. Tiamaniere estas disvastigata la opinio ke gimnastiko havas tre grandan gravecon por la fizika edukado de la infano kaj junulo, pro sia antaŭgarda kaj korektanta efiko, speciale kontraŭ multe da kriplajtoj, kiuj ĉiam minacas la kamparajn infanojn, pro iliaj penigaj laboroj.

Kiel ekzemplo de la grandega interesiĝo pri la korpokzercoj en la kamparaj lernejoj oni povas citi la gimnastikkunvenojn, kiuj estas nepre bona vigligilo por la instruisto kaj por la lernantoj. »

En Francujo, de kelke da tempo, oni utiligas la militservadon por doni al la instruistoj racian instruon pri la gimnastiko. El ĉiuj regionoj kelkaj estas ĉiujare elektitaj por ĉeesti specialan kurson

en la normala gimnastika milita lernejo en Joinville-le-Pont, tiamaniere ke, post sia reiro en la civilan (nemilitistan) vivon, ili povos, siavice, instrui aliajn instruistojn kaj helpi al la disvolviĝo de racia gimnastiko ĉe la junularo.

Jen, nun, kuriozaj sciigoj pri la gimnastiko, kaj la vestaĵoj uzataj por ĝi, en la knabinaj Japanaj lernejoj. Ili estas eltiritaj el la interesaj dokumentoj de Sr^o Steenbuch, parte presitaj en niajn 6^{an} kaj 7^{an} n^ojn.

« Por la gimnastikaj ekzercoj, la knabinoj estas vestitaj per ruĝa basko; tia basko estas uzata de ĉiuj lernejoj kaj instruistinoj sed ne de aliaj japaninoj; la kialo estas ke, ĉar la japana supervesto (la « kimono ») estas sen butonoj kaj tenata nur per zono, ĝi estus tre malkonvena, eble eĉ maldeca, por kuradantaj kaj ludantaj knabinoj; ili do portas sur la « kimono » ankaŭ tre konvenan baskon. La knabinoj de la ĉi tiea lernejo ankaŭ uzas dum la lerneja tempo ŝtrumpojn kaj ŝuojn. Tia estas la kutimo en la plimulto el la altlernejoj knabaj kaj knabinaj, ĉar la lernejoj havas ordinarajn plankojn; sed en la privataj japanaj domoj estas, sur la plankoj, dikaj matoj, sur kiuj ne decas iri kun ŝuoj; tial se, portante ŝuojn, oni deziras eniri japanan domon, oni nepre devas depreni ilin ek-


stere. Generale la japanoj uzas facile depreneblajn lignajn pantofletojn kaj anstataŭ ŝtrumpojn tolaĵajn piedgantojn (« tabi ») kun aparta ujo por la piedfingregoj; sed multaj japanoj (nur tre malmultaj japaninoj) vestas sin laŭ la eŭropa maniero. »

Mi ĉi supre provis prezenti, al niaj legantoj, plene aŭ resume, la informojn ricevitajn antaŭ la ekpublikigo de nia enketo, pri po-

polaj lernejoj. De tiu momento alvenis al mi ankoraŭ novaj tre interesaj dokumentoj pri kiuj mi volas ankoraŭ diri kelkajn vortojn.

Kune kun la informoj pri korpa edukado, Fino Funck donas al ni kelkajn detalojn pri la vivado en la popola dana lernejo, en kiu ŝi instruas. Tiu lernejo enhavas dudek klasĉambrojn, dek por knaboj kaj dek por knabinoj. Je la oka horo, la geknaboj eniras kaj tuj poste, starante, la tuta klaso kantas religian kanton aŭ psalmon. La lernantoj ricevas kvin lecionojn ĉiutage. Ĉiu leciono daŭras kvindek minutojn kaj inter du lecionoj estas ĉiam ludtempo dum dek minutoj, kiujn la lernantoj devas pasigi sur la ludplaco eĉ se la vetero ne estas bela, ĉar tie estas tegmento por ŝirmi la infanojn kontraŭ pluvo kaj neĝo. Je la deka horo la ludtempo daŭras dudek minutojn por ke la infanoj povu manĝi. Du lernantoj ĉiam devas resti en la klaso dum la ludtempo por viŝi la nigran tabulon kaj arangi librojn aŭ ardezojn por la sekvonta leciono.

La infanoj estas instruataj pri la ordinaraj temoj: legado, skribado, kalkulado, religio, historio k. c. La plej junaj havas bildekzercojn anstataŭ his-



DANAJ LERNANTINETOJ.



EN BOHEMA LERNEJO
Korpekzercoj. Salto super ŝnuro.

lernejoj havas lerneajn kuirejojn; tiujn kuirejojn uzas do pluraj lernejoj por la kuirleciono, kiu daŭras du horojn.

Nia bonega samideano, Sr^o Samppa Luoma, kiu jam al ni donis tiel ŝatindajn informojn pri la finnaj lernejoj, reskribis al ni duan leteron kiu vere montras kiel antaŭema estas lia lando; kaj mi ne povas ne raportii, almenaŭ tre mallonge, pri tiu nova dokumento:

«La helpiloj instruaj estas ĉiam tre uzataj, ekzemple geografiaj kartoj, anatomiaj ilustraĵoj, fizikaj, hemiaj kaj astronomiaj maŝinoj kaj kolektaĵoj. Botanikon oni lernas printempe kaj aŭtune, kaj uzas naturajn kreskaĵojn kiel helpilon, farante ekskursojn sur kampoj kaj en arbarojn, aŭ alportante kreskaĵojn por la lernada horo. Mi havas tamen 200 botanikajn ilustraĵojn laŭnature kolorigitajn. Desegnon, akvokolorpentron kaj muzikon oni lernas du horojn ĉiusemajne. Pri higieno estas unujara kurso pri homa anatomio, kaj same unujara kurso pri fiziologio, sume 120 lecionoj kune kun fiziko kaj hemio. Ni instruas pri plej gravaj nutraĵoj atentigante zorge la lernantojn pri alkoholismo.

El fiziko estas lernataj meĥaniko, lumaj, varmaj kaj iom aliaj radioj, voĉo, elektro, akcelaj movoj, yapormaŝino kaj atmosfera premo. Ĉia fizika kaj hemia instruado estas farita per eksperimentoj, kiujn la instruisto unue faras, kaj kiujn la lernantoj hejme studadas. En Finnlando, kiel aliloke, la instruistoj ankaŭ tro multe lernigas parole, sed tamen ĉiuj multe klopodas, por ke la scienco povu esti ankaŭ praktike lernata; sed tio ne estas facila en lernejo, inter kvar muroj: lernejo estas lernejo, kaj la vivo estas la vivo, de tio oni nenien forkuros.

En Finnlando, la instruisto neniam uzas lernantojn kiel helpajn instruantojn.

Mi ankaŭ konsentas grandan valoron al la ludoj, kaj ankaŭ al la sportoj. Ni multe ekzercadas per skioj dum nia longa vintra sezono.

Tre ofte, en vilaĝaj lernejoj, la pureco de la infanoj ne estas kontentiga; tamen en Finnlando ĉiu hejmo havas sian propran banejon, nomatan «Sauna», en kiu ĉiuj sin lavas ĉiun sabaton vespere.»

La vivado en la duagradaj lernejoj.

Ni nun lasu la unuagradajn lernejojn kaj ni komencu ekzameni la vivadon en la duagradaj lernejoj. Antaŭ ol paroli pri la tute modernaj lernejoj anglaj, francaj, germanaj, pri kiuj ni ricevis tre interesajn dokumentojn, ni komence priskribu pli malnovan

torion, geografion kaj zoologion, kaj la plej maljunaj ankaŭ ricevas lecionojn pri desegnado kaj pri germana lingvo. Krom tio, la knaboj havas lecionojn pri geometrio, kaj la knabinoj lernas kudradon kaj kuirarton; sed nur kelkaj

edukadon sistemon, en kiu religio havas plej gravan rolon. Ĉi sube ni donas la interesan raporton verkitan por nia enketo, de Sr^{ino} S. Hulanicka (Polujo).

«El la diversaj manieroj por edukadi kaj instruadi junularon, la malplej konata en la mondo estas la monahineja edukado. Ĝiajn originalajn kaj kuriozajn rimedojn por bonigi la junulinojn, mi volas iom konigi, al la legantoj, priskribante polan knabinan monahinejon.

Ĉi tiu dukejo fondiĝis, sub alvoko de Sankta Virgulino, antaŭ jam proksimume 50 jaroj en Galicio (Poluja parto sub aŭstria regno), kaj nun posedas kvar domojn, ĉiu enhavanta 60-70 lernantinojn, tie loĝantajn.

En la instruprogramejo, unuan lokon okupas religio; sekvantan okupas lingvoj nacia kaj fremdaj, franca, germana kaj angla; postan, la aliaj sciencoj; lastan la naturaj.

El artoj oni instruas pri muziko, kanto, desegno, pentro kaj danco. Al la arta fako oni povas alkalkuli teatraĵojn luditajn de la lernantinoj. Pro sia fantazieco kaj poezieco, teatro disvolvas la bonguston kaj la lertecon, pri kiuj oni multe zorgas en la monahinejo.

Ĉiujn lecionojn, escepte tiujn pri fremdaj lingvoj kaj danco, donas la fratulinoj per nepresitaj lernolibroj kiujn ili mem verkis.

La tuta klasaro estas dividita je 3 grupoj: la unua enhavanta tri unuajn klasojn nomiĝas: «malgranda», la du sekvantaj enhavantaj du klasojn nomiĝas «meza» kaj «granda». La malgrandaj havas entute ok horojn da lecionoj; la mezaj kaj grandaj naŭ.

Ĉiu klaso havas sian «anĝelon». Tiu ĉi belan nomon ricevas siavice ĉiu lernantino unu seĝmanon, dum kiu ŝi devas zorgi pri bona lernado kaj bona konduto de sia klaso. Dimanĉon, dum la klasa kunsido kun la subestrino, ŝi raportas pri la pasinta semajno. Krom tio, ĉiu lernantino devas dum la kunsido konfesi siajn malbonajn farojn (malobeeco, malĝentileco k. a.) Se la malbona faro estas grava, ŝi devas, ne atendante la kunsidon, sciigi l'estrinon aŭ subestrinon pri tio. Se la kulpulino tion fari ne volas, l'anĝelo estas rajtigita ŝin konduki al la subestrino kaj ŝin kulpigi. Ĉiu fraŭlino havas la rajton komuniki al la Fratulino la malbonaĵon viditan, kaj eĉ ŝi tion devas fari, ĉar, se ne, ŝi partoprenas la malbonaĵon. Tiuj konfeso estas severe prizorgataj, ĉar laŭ la opinio de la Fratulinoj, tio disvolvas la konsciencan sentemon, kaj, kiel humileca ago, malgrandigas la kulpon kaj purigas la koron.

La fraŭlinoj dum la tuta tago estas observataj de monahinoj, kiuj ankaŭ iliajn leterojn sendotajn aŭ ricevatajn tral'egas.

La plej granda puno, malofte uzata, estas la «forpartigo». La punatino restas dum unu tago aŭ pli, tute sola. Malpermesite estas paroli aŭ ludi kun ŝi. Du fojojn en jaro okazas la



EN BOHEMA LERNEJO
Tagmeza ludo.



AMBAŬSEKSA LERNEJO EN POLUJO.

« grandaj kunsidoj ». En vasta ĉambrego, ĉe unu flanko, sidiĝas la instruistinoj de la monaĥinejo, ĉe kontraŭa flanko, ĉiu grupo siavice. Kaj tiam la Fratulinaj priparolas, laŭdante, aŭ mallaŭdante, la lernadon kaj la konduton de ĉiu lernantino, kiu, starante, silente aŭdas la juĝadon. Fine, l' estrino fermas la kunsidon esprimante sian kontentecon aŭ esperon pri baldaŭa korektiĝo, kiun la lernantinoj promesas.

En la tuta instruado kaj edukado, la monaĥinoj penas inspiri al la lernantinoj sian kredon kaj filozofion pri la vivo: tutegan konfidon en Dio kaj, pro obeeco kaj amo al li, akcepton de l' sorto, kiun li sendas al ni.

Jen proksimume la monaĥineja edukada programo. Kia ĝi estas laŭ pedagogia vidpunkto, juĝu vi mem, legantoj. Mi nur permesos al mi, finante tiun iom sekan priskribon, aldoni memoraĵon pri bela momento pasigita en la monaĥinejo. Ĝi estas la horo por vesperaj preĝoj, kiam la nekonataj kaj forgesitaj Fratulinaj preĝas por la tuta mondo. En

la preĝejo regas profunda silento kaj preskaŭ mallumo. L'aero, trapenetrata de dolĉaodoro de floroj, havas ian preĝejan varmecon. L'altaro kvazaŭ tra blujaj vaporoj konfuziĝas kaj antaŭ ĝi, alte pendanta, ruĝa lampeto tremas... Kaj en tiu mistera silento laŭtiĝas subite maljunula tremanta voĉo de l' estrino: *Por la pekuloj — Por la nekreduloj — Patro nia...*

Je ambaŭ flankoj, ĥoroj de blankaj Fratulinaj respondas:

— *Patro nia, kiu en ĉielo estas...*

— *Por malfeliĉuloj, por orfoj...*

Apud l' altaro forte odoras la floroj; la ruĝa lampeto ĵetas tremantajn, misterajn lumojn... »

TH. ROUSSEAU.

T. RUSO.

N. B. — Erare, ĉe la fino de mia raporto de la Marta n^o, mi citis: *Pola Antologio de Kabe: En Svisujo*. La verkaĵo pri kiu mi intencis paroli estas *Pola Antologio de Kabe: Sur la Verdeko*, tradukita el Stefan Zeromki.

PROFESORO DOKTORO OSTWALD ĈE LA DUA GERMANA ESPERANTISTA KONGRESO.

Ni ricevis de S^o Sergius Winkelmann, el Dresden, interesajn sciigojn pri tiu kongreso, kiu, tre lerte organizita, bonege montris la progresojn de Esperanto en Germanujo.

Ne povante raportu plene pri ĝi en ĉi tiu n^o, ni volas almenaŭ doni la resumon de la grava parolado farita de nia fama germana samideano, sekreta kortegkonsilisto, P^o D^o Ostwald.

« Li ne parolis kiel esperantisto, sed pritraktis ĝenerale pri la internacia mondlingvo. Li diris, ke Esperanto disvolviĝas tielmaniere, kiel neniam homo ĝin estus kredinta.

Pri la signifo de la ideo pri internacia mondlingvo por la tuta kulturmondo, la parolanto opinias, ke oni povas kompari la eltrovon de Esperanto nur kun la eltrovo de la presarto. Tiu ĉi historia okazo ebligis la publikigadon de poetoj kaj sciencaj verkoj por ĉiuj kategorioj de l' homoj. La mondlingvo disrompos la barilojn inter la diversaj nacioj, plifaciligos la pensan interŝanĝon kaj la spiritan interkomunikigon. Ostwald mem lernis multe da lingvoj en sia vivo kaj diris, ke la opinio pri la interna propra valoro de la lingvoj estus tre malfacile subigebla; sed tia lingva studado ensorbas multe da tempo. Per la enkonduko de la mondlingvo en la lernejojn, oni plimal-

grandigus la lingvan studadon, kiu nun postulas 65 % da tempo. Provizore la lingva studado estas nevenkebla malhelpaĵo kontraŭ la enkonduko de Esperanto. Sed la esperantistoj, ja, ne volas forigi siajn naciajn lingvojn, per kiuj ili estas edukitaj, kiujn ili amas. En la internkomunikaĵo, ili volas kompreneble uzi ilin; sed la mondlingvon ili postulas por la internaciaj rilatoj inter la popoloj. Je la flanko de la familia domo, ili volas konstrui kvazaŭ mondan interkomunikan domon; kaj Esperanto ŝajnas al ili la taŭgan materialon por tia ĉiutempa konstruo. Prof. Ostwald diris ankoraŭ ke Esperanto estas la plej uzebla kaj disolvebla inter la ĝis nun kreitaj mondlingvoj. Sed la esperantistoj devos ĉiam resti kunigitaj kaj ne agi je la ekzemplo de la antaŭbatalintoj por la internacia mondlingvo. Ili memoru la vortojn, ofte maluzatajn, de la fama generalo kaj strategiisto Moltke: « Marŝi aparte, batali unuigite », ĉar la afero koncernas la kreadon de verko por centjaroj kaj miljaroj.

Longa kaj entuziasma aplaŭdego sekvis la parolojn de l' fama scienculo. ... »

El raporto de S^o SERGIUS WINKELMANN.

La kreskajoj artefaritaj.

Tiu freneza revo, krei senpere vivantan materion, okupas ĉiam scienculojn, kaj la malsimpleco de la afero, la grandegaj malfacilaĵoj kiujn renkontas la serĉuloj estas tiaj, ke la problemoj ŝajnas nesolveblaj. Mi jam parolis pri tiu afero (1a jaro, p. 123) kaj precipe pri eksperimentoj de profesoro Stefano Leduc de la Lernejo Medicina de Nantes. De unu jaro li daŭrigis siajn provojn kaj atingis interesajn rezultatojn. La ĉeloj kiujn li elfaris konsistas el unu parto de kuprosulfato kaj du partoj de sukero aŭ glikoso. Unu el tiuj globetoj aŭ *semoj*, kiu, diametre, havas malpli ol 1 milimetron, li metas en gelatenon enhavantan 3 aŭ 4 % da kaliferociano kaj iom da sodioklorido. Tiu globeto, kiel semo, tre rapide kreskas kaj oni povas havi kulturajojn de kreskaĵoj artefaritaj, kiuj kreskas laŭ profundeco aŭ supraĵo, kiam gelateno kuŝas en tubo aŭ en ujo plata. Oni povas ricevi kiel verajn vegetaĵojn, kun trunketoj, branĉetojn, foliojn, similajn al akvaj kreskaĵoj aŭ maraj algoj, kaj kies longeco povas atingi ĝis 30, 40, aŭ 50 centimetroj.

Tiuj kreskaĵoj artefaritaj, kiuj videble ne povas reproduktiĝi, havas tamen la plej grandan parton de la ecoj de naturaj kreskaĵoj: ekzemple, oni povas konstati la fenomenojn de kreskado kaj de osmozo (1); ili estas sentemaj je la venenoj kaj anestezikaj materioj; kloroformo haltigas ilian vastigadon. Lumo kaj varmo agas sur tiujn ĉi kiel sur vivantajn kreskaĵojn. Per sekigado, iliaj movoj haltiĝas, kaj ili prezentas vivon haltigitan de semoj aŭ de malgrandaj bestoj *rotiferoj*, ĉar ilia vivo reaperas, kiam oni al ili redonas la necesan akvon. Ili havas aparaton de ĉirkaŭirado, en kiu, kiel suko en plantoj, sukero kaj membranonaska substanco supreniras ĝis 30 cmj alte. Tiu fenomeno de kreskado estis, ĝis nun, karakteriza de vivo: efektive la kristaloj kreskas per kunigo, kiel muro per kunigo de ŝtonoj; kontraŭe la estaĵoj vivantaj kreskas per mikrado de sia substanco kun ensorbata substanco.

Nur unu problemoj ne estas ankoraŭ solvita: la reproduktado per serio. Oni scias ke, kiam ĉelo volas naski alian, multaj kuriozaj fenomenoj malsimplaj okazas; la plasmaj (2) kunvolviĝas kiel ŝnureto, dividiĝas en du partoj, kiuj iom post iom disiras, kaj poste naskas du ĉelojn. Tiun fenomenon mem S^{ro} Leduc certigas ke li elfaris, kaŭzante malrapidajn movojn de difuzo (3), similajn al tiuj, kiuj okazas en la reproduktado de la ovo.

Tiuj rezultatoj alportas jam gravan nombron da sinsekvaj stadioj inter la mondoj minerala kaj vivanta; ili montras la frukteblecon de vidpunktoj novaj, kiuj ilin inspiris kaj de metodoj, per kiuj oni ilin atingis.

Kiu aŭdas nur unu sonorilon, aŭdas nur unu sonon, diras ia proverbo. Kelkaj scienculoj ne akceptas tiujn eksperimentojn kaj kontraŭbatalas la ideojn de S^{ro} Leduc. Tiuj eltrovoj ne estas novaj, diras S^{ro} G. Bonnier; jam en 1863, profesoro Traube, el universitato de Léna, ricevis kristaladaĵojn, pli malpli arboformajn, kun samaj substancoj, kiel S^{ro} Leduc. Tiuj eksperimentoj estas faritaj en ĉiuj kursoj, kaj oni scias ke tiuj aĵoj havas nenian kapablon de vivantaj materioj. S^{ro} Dolfus ricevis mem tre rapide, pli rapide ol S^{ro} Leduc, kristalajojn tuboformajn, ĵetante kristaleron de kupoklorido en solvaĵon de kuprosilikato: subite el la kristalo naskiĝas kaj supreniras kolono kava trunkoforma, kiu branĉiĝas, platiĝas folioforme, alvenas ĝis la supraĵo kaj rapide etendiĝas. « Tiuj artefaritaj kreskaĵoj kreskas sendube, sed nur per senĉesa agado de ĉi ĉi hemiaj substancoj. En la plej malgranda ero de histoj ĉelaj estas kunigitaj ĉiuj influoj prapatraj, ĉiuj elementoj de ĉi aliformiĝado, kiuj elvenas el estinteco kaj preparas la ĉi estontecon. Kiel do supozu ke oni povu proksimiĝi, eĉ ĉi iomete, tiun mirindan elfensaĵon nur per ĉi ĉi hemiaj procedoj? »

Malgraŭ tiuj kontraŭdiroj, S^{ro} Leduc certigas ke liaj eksperimentoj estas seriozaj; cetere, se la francaj scienculoj ne akceptas ilin, la germanaj faris al li honoron peti sciigojn kaj gratuli lin, kaj S^{ro} d'Arsonval rimarkigas ke la germanaj scienculoj ne estus favore akceptintaj tiujn laborojn, se ili ne estus bonegaj.

Fine S^{ro} Leduc atentigas al la graveco de nutra materio sur

la formoj de kreskado de tiuj kreskaĵoj: la kali-kaj sodioklorido donas kreskaĵojn vermformajn, la kaliazotato dornojn kaj amoniumklorido, kreskaĵojn similajn al floroj de aveloj.

Aliaflanke S^{ro} Yves Delage faris serĉadojn tre interesajn sed malpli reklamemajn pri vivantaj organismoj kaj pri la kondiĉoj de ilia reproduktado. Li penadas doni vivon al ĝermo de organismoj fortiritaj el ilia natura vivloko, kaj li elektis la estaĵojn kies organismo estas la plej simplega.

Li uzas solvaĵojn de sodioklorido, kies koncentrado estas pli forta ol tiu de la akvo mara: « Tiuj solvoj, li diras, estas tiel fortaj, ke, anstataŭ ensorbi akvon, ili ŝvitigas ĝin. Aldonante iom da nikelklorido (sed ne tro, ĉar ĝi estus veneno) mi ricevis larvojn multe pli viveblajn ol antaŭe. La procento de la multigado de la ĉeloj multe pligrandiĝis, ĝis 60 kaj 80 %. La larvoj tiel kreitaj en mia laborejo estas pli persistaj ol tiuj, kiuj en natura loko kreskas. Kelkaj el ili atingis stadion de metamorfozo kaj iĝis junaj « oursins », sed mi ne ankoraŭ sukcesis havi plenkreskajn: sed en naturo, apenaŭ unu el 2 milionoj povas plenkreski, kaj en mia laborejo mi havis nur 200; mi pensas tamen ke mi sukcesos pri tio. »

Kiaj ajn estas la rezultatoj, estas tamen kurioze konstati, ke ĉi ĉi hemia substanco kiel nikelo povas tiel influi sur kreskado kaj vastigado de vivantaj ĉeloj.

Fotografado de la parolo.

Kvankam tiu ĉi sciigo ŝajnas mirinda, ĝi tamen estas verega. Oni povas nune fotografi la parolon; kaj la specialaj signoj, kiuj transskribas la vibradojn de sonoj estas sufiĉe netaj kaj karakterizaj, por ke oni povu legi unu el tiuj paĝoj, kie la paroloj estas fotografitaj kiel oni povas deĉifri folion de stenografio.

Tiu nova eltrovo de doktoro Morage estas nur malgranda ŝanĝo de mirinda aparato de rapida telegrafio de S^{roj} Pollak kaj Virag.

Por kompreni la funkciadon de tiu aparato, kiu povas transsendi 40,000 vortojn ĉiuhore (dum la malnova Morse transsendas nur 400, Hugues 1000 kaj Baudot 4000), supozu ke la depeŝo transsendota estas unue skribita per skribmaŝino, kiu, anstataŭ desegni literojn, montras ilin per serio da truoj. Tiu traborita papero, lokita en la elsendloko, pasigas, laŭ grandeco kaj pono de tiuj truoj, fluadojn elektrajn pli malpli grandajn kaj sinsekvajn. En la ricevloko, luma radio fiksa estas sendita sur speguleton, kiun osciligas (4) tiuj fluoj, kaj la refleksitaj (5) radioj falas sur paperon fotografan, kiu malvolviĝas kaj estas malsame impresita. La ŝeleto (filmo) iras poste en rivelbanon (6) kaj en fiksbanon (7), kaj antaŭ ol la depeŝo de la elsendloko estu tute transsendita, oni vidas sur banderolo malseka, la unuajn vortojn tre speciale skribitajn, sed tute netajn.

Por enskribi fotografe la sonojn kaj la parolon, oni ŝanĝas nur la manipulilon (8), kaj oni ĝin anstataŭas per mikrofono. La sonoj vibrigas ankaŭ la moveblan spegulon kaj la radio luma impresas la ŝeleton. Vokaloj kaj konsonantoj estas tradukitaj malsame per pli malpli dikaj kaj grandaj linioj specialformaj.

Tiu fenomeno plisimpligas la instruadon de la muziko. La diskoj kaj tuboj de fonografoj enskribas ankaŭ parolojn kaj sonojn, sed neniu povas ilin deĉifri, oni mem ne povas sciigi, ĉu ili estas impresitaj de muzikilo, de orkestro aŭ de parolo homa. Kaj tion ĉi ebligas la aparato de S^{roj} Pollak-Virag: oni povas senpere distingi parolon, kanton aŭ muzikilon: la linioj diversaj estas tute malsamaj kaj karakterizaj.


Rimarku ke jam, en 1891, S^{ro} Demyen sukcesis fotografi la movojn rapidajn faritajn de voĉa organo dum ĝia funkciado.

Tiuj serioj kronofotografaj, lokitaj en aparaton specialan, *fonoskopo* (9), aŭ senditaj sur ŝirmilon, donis figuraĵojn de buŝo parolanta: la lernantoj de la Instituto de surdmultuloj povis rekoni tiel la vortojn kaj frazojn elparolitajn de tiu artefarita parolanto.

Oni povas eĉ diri, ke la nuna kinematografilo elvenas el tiu fonoskopo.

MARCEL FINOT.

(1) Osmozo : A. F. G. osmose. — (2) Plasmaj : A. G. plasma, F. plasme. — (3) Difuzo : A. F. G. diffusion. — (4) Oscili : F. osciller, A. oscillate, G. oscilliren. — (5) Refleksi : F. réfléchir, A. to reflect, G. reflektiren. — (6) Riveli : F. révéler, A. to develop, G. entwickeln. — (7) Fiksi : F. fixer, A. to fix, G. befestigen. — (8) Manipuli : F. manipuler, A. to manipulate, G. manipuliren. — (9) Phoné = voĉo, skopein = vidi.



ANTAŬ LA MURO.

Ludo de la « Peloto ⁽¹⁾ ».

La ludo de la « pelota » estas tre divastigita en Hispanujo. Ne malofte oni vidas infanojn ludantajn pelote per malgranda pilko: unu el ili jetas ĝin al muro kaj alia rejetas ĝin per malfermita mano, kiam ĝi estas saltinta sur la tero. Tiu, kiu ne povas rejeti la pilkon malgajnas.

Sed ne nur la infanoj ludas je tiu manpilko. Ankaŭ la fraŭloj ludas je ĝi, kiel laŭtenise. Anstataŭ havi laŭtenisan plankon oni havas grandan muron uzata por la ludo. Oni ne ludas ankaŭ nur per la mano, sed oni havas « chisteras'ojn » t. e. mankorboj havantaj rondan kaj konkavan formon, kiujn oni fiksis al la mano per ganto (Vidu la jenajn bildojn.). Per tiu ilo, oni povas jeti la pilkon multe pli forte kaj tiel estas pli malfacile por la aliuoj ĝin ekkapti.

Krom la junuloj, kiuj praktikas tiun ludon kiel sporton, ekzistas la metiaj pelotistoj, kiuj ludas en ludejo nomata « fronton » antaŭ la publiko. Ili formas du partiojn kun diversaj koloroj, ekzemple ruĝa

kaj blua kaj la publiko povas veti por unu koloro, kiel ĉe ĉevalkurado.

La « fronton'oj » estas grandaj ĉambregoj. Unuflanke staras la muro per kiu oni ludas, antaŭ ĝi estas la planko sur kiu kuras la ludistoj por ekkapti la resaltintan pilkon. Malantaŭe kaj flanke de la ludistoj sidas la publiko amfiteatre, protektita kutime per retoj, ĉar oni jetas la pilkon tiel forte, ke ne estus tute sendangere ricevi ĝin sur sin anstataŭ la muro.

Por gajni unu ludon, oni devas atingi definitan kvanton da poentoj, sed kelkfoje, se la ludistoj estas bonaj kaj preskaŭ samlertaj, ĝi povas daŭri kompreneble sufiĉe longe ĝis oni havas nur unu poenton, kaj ĉar oni sin sekvas reciproke preskaŭ ĉiam, oni bezonas longan tempon antaŭ ol havi la finan nombron. Ĉe tiu okazo, la ludo estas nature tre interesplena.

J. MATTES,
el Barcelona.



(1). Hispanie : pelota ; france : pelote ; Esperante, eble : manpilko.



Tra Mez-Afriko de Komandanto LEMAIRE CH. (Belgujo).

Dank' al la afableco de la aŭtoro, ni povas hodiaŭ doni eltiraĵojn de la rimarkinda volumo, pri kiu ni jam parolis. Ni elektis paragrafojn montrantajn kune la humanecon de nia distinga samideano kaj amiko, kaj lian observan fakulton. Ili koncernas la nigrulojn, la necesegajn helpantojn de l' blankulo tra sovaĝaj landoj.

...Sed supozu nian laboradon finita en ia speciala loko.

Ree devas ekvojiri la karavano.

Vidu je kia aranĝo marŝadas tiuj kuraĝaj negroj, pri kiuj, tiel ofte, oni diras multe da malbonaĵoj.

Jen estas soldatoj kiuj portas siajn armilojn, kartoĉojn kaj tutan pakajon tenatan surdorse, per rimeno pasanta surfrunte. Jen estas du portistoj kun duobla ŝarĝo; tie virino portas multepezan korbon plenan da nutraĵo, potoj, k. t. p.

Jen infano ĝoje portanta ĉirkaŭ dudek kilogramojn.

Nu! dum horoj kaj horoj, la kilometroj sekvas la kilometrojn; kaj tiuj homoj, kuraĝaj kvankam nigraj, faros la ĉiutagan iradon sen plendo, sen murmuro, kondiĉe tamen ke la «blankuloj» de l' ekspedicio agu juste kun la nigruloj; ke ili liberigu je ŝarĝo, la malsanulojn kaj la kriplulojn; ke, okaze, al tiuj ĉi estu donata pendlito; ke oni zorgu por ke la nutraĵo de l' nigruloj estu sufiĉa, k. t. p.

Je tia kondiĉo, tiuj kuraĝaj idoj de l' lando sune heligata kaj varmigata, efektiviĝos, ĉiutage, marŝadojn da dudek, tridek, kvardek kilometroj, kaj plu; poste, alveninte al la tendaro, ili malpurigos la lokon elektitan por starigi la tendojn; ili iros ĉerpi akvon por la bano de l' blankuloj kaj por ilia kuirejo; kolekti hejtan lignaĵon; fiŝkaptadi aŭ ĉasi, k. t. p., k. t. p.

Kaj nur kiam la «blankulo» estos komforte loĝigata, nur tiam la «malbonaj nigruloj» zorgos por si mem; ili ekbruligos siajn fajrojn, kuiras simplegan manĝaĵon, kun kiu ili trinkos nur akvon.

Pri la nokto, ili kuŝigos sin ĉirkaŭ la fajroj, surtere mem, envolvitaj en peco da malbona kovrilo disŝirata, dezirante de ĉielo nur unu favoron, t. e. ke ne pluvu dum la nokto.

Ĉar kiam ekfalas la pluvo, la «malbonaj negroj» havas nenion por ŝirmi sin.



LA KARAVANO TRA L' ARBARO.

La «eŭropano», ja, estas en bona rifuĝejo sub sia tendo, sur sia komforta kuŝejeto sed, kiam pluvas, liaj nigraj servistoj havas nenian rifuĝejeton; sub ia arbo pli densa ol aliaj, ili premiĝas unuj apud la aliaj, kiel eble plej mallarĝe, por malpli-grandigi la supraĵon de ĉia malfeliĉa korpo malvarmigantan senpere; kaj, dum la tuta nokto, sidantaj ĉirkaŭ la estingiĝintaj fajroj, ili ĝemas senfinan psalmokanton, dirante sian rezignacion de malfeliĉaj homoj, de malfeliĉuloj, vere, kiujn tiel facile ni malŝatas; tamen, sen ili, ni ne povus marŝi, eĉ nur dum unu tago, en Mez-Afriko.

Malfeliĉaj ja! kaj tamen kuraĝaj! lertaj!

Ĉu oni devas transiri riveron? Ili ekserĉas kaj trovas transirejon, riskante esti glutataj de krokodilo.

Ĉu eble la rivero ne estas transirebla?

Tu, la negroj aranĝos ponton per lianoj; ili faligos ian dikan arbegon kaj kavigos ĝin por ricevi pirogon; pirogo estas barko de nigrulo.

Kaj ĉio iĝas propramove, sen ia helpo de l' blankulo.

Estas ja bone se, la simiaponto finita, la blankuloj ne koleras pro la malfacileco de l' transiro.

Tamen la blankulo transportas nur sian beletan korpeton, dum la nigrulo, transirante la saman ponton, havas ŝarĝon sur kapo aŭ sultro.

Sed pri tio ĉi ni ne interesigās; ni ne notas sur nia notlibreto ke la nigrulo, konstruante lianaponton, kaj ĝin transpante kun ŝarĝo sur kapo, etektivigas, por nia profito, aferon, kies etektivigo ne estus ebla de ni mem.

Ĉu pirogo estas kavigota? Observu kiel certe la negro elektas la taŭgan arbon, ne nur pro ĝia formo kaj ĝiaj ampleksoj, sed ankaŭ pro ĝia speco.

Observu kiel okulsperte, li determinas la parton ĉe kiu iĝos la fundo de l' boato; kiel lerte li kavigas tiun primitivan barkon, sen kiu, ja, via vojaĝado interrompigus.

Nu, farinte tiajn rimarkojn, donu bonan noton al tiuj « malbonaj negroj », kaj danku ilin pro tio ke ili, tiel sindoneme, kunhelpas vin por akiri riĉaĵojn kaj honoraĵojn.

... Kiel oni sendube ekpensas, la virina flanko de Afriko havas multe da rimarkindaj punktoj.

Jen, ekzemple, virinoj kies harornamo, serĉade kaj malsimplece, nenion cedas al la plej serĉadita kaj malsimpla harornamo de Eŭropo.


Tagojn, semajnojn, eĉ monatojn oni bezonas por elfini tian harornamon, je kiu perloj estas trapikitaj laŭlonge la haroj mem; tiuj perloj estas diverskoloraj, blankaj, bluaj, ruĝaj; oni almetas, ankaŭ, konkojn nomatajn « kori ».

Oni povas ridi pri tiaj harornamoj, sed kio naskos tiun ridon se ne tio ke ni ekvidas ion antaŭe ne viditan; kaj tio sufiĉas por ke ni opiniu la aferon vere strangaĉa.

Permesu al mi diri ke, kiam nigra sovaĝo vidas blankan sovaĝon, li same ridas lian vestaĵon, kaj la detalon de liaj galanterioj. Do, la sovaĝo blanka aŭ nigra kondutas, en tiu okazo, ĝuste unu kiel la alia. Cetere, oni povas kredi min, ili havas ankoraŭ multe da aliaj punktoj de simileco.

Ekzemple, sur la jena fotografajo vi vidos enlandulojn kies hararo estas longa pli ol du metroj; unu havas sian harligon malvovitan kaj trenigantan tere; alia havas ĝin skarpe ĉirkaŭ sia brusto.

Ĉu mi devas diri al vi ke tiaj haroj tiel longaj estas nur falsaĵoj, uzataj de kelkaj loĝantaroj borde de la rivero Ubangi-o?



Vidinte ilin por la unuafojo, blankuloj kredis ke tiuj haroj estas naturaj; ili ĝojis pri tia eltrovo pro kiu ilia nomo baldaŭ fariĝos fama kaj neforgesinda. Ili ne zorgis eĉ palpi la malglatajn ŝnuretojn, sur kiuj estas aranĝita tiu longa kaj densa harligo.

Kompreneble venis, poste, alia vojaĝisto, kiu ĝojis nemalplimulte, reigante la veron, naskante la ridon pri siaj antaŭirintoj, tiel kredemaj kaŭze ke ilia kredemo estis estonta bona afero por ilia famo de vojaĝisto.

Ĉu tia portado de falshararo ne estas punkto de perfekta simileco inter blankulo kaj nigrulo....

Komandanto LEMAIRE CH.

Guteton da Lakto!

De A. AGARONJAN. El armena lingvo tradukis armena samideano G. DAVIDOV.

El la vivo de Armenoj, dum la buĉado de Armenoj en Turkujo.

Komenco de aŭtuno. Brila, luna nokto. En la ĉirkaŭaĵo de Surmali (1), tiutempe, estadas tre malvarme.

En la vilaĝo B. fariĝis tiel malvarme, ke neniu kuraĝis dormi en korto.

En mallarĝaj, kurbaj stratoj jam estis nenia movado.

Apud pordegoj kuŝis hundoj, kiuj, metinte la kapojn sur la piedegojn, observadis ĉian suspektindan ombron aŭ malfruigintan preterpasanton, por ĵeti sin sur ĝin. Ne dormis ankaŭ la gardistoj de l' legomaj ĝardenoj; sidante en siaj mizeraj tendoj, ili penadis distingi de malproksime ian suspektindan figuron, similan al ŝtelisto. Iafoje, por ke oni sciu, ke ili maldormas aŭ, eble, pro timo, ili plenigis la aeron je siaj kriegoj: « Aj-Uj », kiuj sonadadis super la kamparo. La hundoj en la vilaĝo komencadis sian senĉesan blekon.

Baldaŭ ree fariĝis tomba silento. Noktomeze, la vetero fariĝadis pli kaj pli malvarma.

En la vilaĝo B. ne dormis nur unu familio, konsistanta el gepatroj kaj el ilia malgranda infano. Ili ne estis loĝantoj del' vilaĝo B. sed estis « gaktakan » (elmigranto), kiuj, nur tiun tagon, atingis ĉi tiun vilaĝon. Eĉ oni ne povas ilin nomi « gaktakan » tial ke, kiam oni diras gaktakan, ĉiam oni imagas tian staton, ĉe kiu alirantaj el malproksime havas ion: sakon, ŝiritan « arkaluk » (nacia armena kostumo), disŝiritajn ŝuojn; sed ĉi tiuj mizeruloj estis senigitaj ĉion kaj estis nudaj en la plena senco de tiu vorto, se ni ne kalkulos kiel veston, tiujn ĉifonaĵojn, per kiuj estis kovrita ilia nudeco.

Ĉu vi vidis, leganto, ŝafon eltiritan el la buŝego de malsata vulpo, sen vostaĵo, sangumitan, duonmortan kaj malsanan? Similan aspekton havis tiuj ĉi mizeruloj, gaktakanoj, kiuj pli estis similaj al mortintoj ol al vivantoj.

Kiel loĝejo servis — ia kurba kun malnovaj muroj — « samannik », (2) kies unu muro jam estis elfalinta, tra kiu la luna lumo penetradis en ilian mizeran loĝejaĉon. La putriĝinta herbo sur la muroj malbonodoris.

Ĉe la elfalinta muro pendis traboj kiuj ĉiuminute minacis fali; la plafono kaj la traboj estis kovritaj per araneaĵo, kaj ĉi tiun angulon la mizeruloj ricevis kiel almozon, kaj por ili ĝi estis preskaŭ neesperita feliĉaĵo.

Sur malseka, putriĝinta tero sidas en ĉifonaĵo virino mezaĝa, klininta la kapon. Sur ŝia malgrasa vizaĝo, laceco, timo, malĝojego kaj malsano kuŝigis neforigeblan postsignon. Sur ŝiaj sekiĝintaj duonnudaj genuoj kuŝis, en antaŭmorta agonio, infano, 4-5 jara, ankaŭ malgrasa kaj duonnuda. La morto ludis sur ĝia malgrasa vizaĝo. Apud ili, genuflekse, kun la manoj kunplektitaj, staris viro; li atenteme, ne palpebrumante, rigardis la infanon kaj observis kiel iom post iom malfortiĝadis ĝia spirado; iafoje li profunde ĝemis kaj frotis siajn genuojn.

Estas tre karaj, kompreneble, al la gepatroj la infanoj! Venos la tempo, kiam ili kreskos, fariĝos apogo por ili dum malfeliĉaj tagoj — estos anĝelzorgantoj por ili; tiam estos forgesataj ĉiuj pezaj zorgoj, sendormaj noktoj...

Sed kiel pli kara estas ĉi tiu infano al tia malfeliĉa patro, kiu por savi ĝin, kiel karegan portajon portadis ĝin sur siaj ŝultroj kelkajn centojn da verstoj, trans altegaj montoj, profundegaj kavoj, noktpasadis en teruraj kavernoj. Kun tiel granda malfacileco li alportis sian etulon en la vilaĝon!

Tra la elfalinta muro, per larĝa fendo, vespera malvarma vento freŝigis la « samannik ».

Estis malvarme. La mizeruloj tremadis. La patrino penadis per siaj ĉifonaĵoj surkovri la nudan korpon de l' infano. Ŝi penadis per ili varmigi ĝian iom post iom malvarmigintan korpon. Sed estis vane! Per solaj ĉifonaĵoj ne estis eble kovri ĝin; tiam la kompatinda patrino, en malespero, sin mem klinis sur ĝin, esperante tiamaniere defendi sian infanon kontraŭ la vento.

La patro, kiu ĉiun momente, kun senesprimaj okuloj rigardadis tion, kio fariĝadis ĉirkaŭe, subite kvazaŭ rekonsciigis, demetis sian ŝiritan « arkalukon », kovris per ĝi la infanon, kaj li mem restis tute nuda.

Senfina malĝojego senigis ilin je la ebleco sentadi la malvarmon. Silentadis.

— Panjo, guteton da lakto! — subite elparolis la infano, larĝe malfermante la okulojn, kiu ree fermiĝis. La gepatroj rigardis unu la alian kaj ekploris.

— Ekŝrapu ian ajn pardon: ja oni kristano estas, — petu guteton da lakto por malsana infano, — diris la edzino.

— Kien iri noktomeze: ĉiuj dormas; kiu malfermos la pardonon por mi?

Kaj refariĝis kviete: nur grilo kraketis en la fendoj; kaj muso mordetis siajn provizojn; malvarma vento daŭris blovadi kaj sibladi en la fendoj.

— Guteton da lakto! — ree elparolis la infano, malfermis la okulojn, rigardis sian patrinon kaj ree fermis ilin.

Ankoraŭ unu fojon la gepatroj rigardis unu la alian kun larmoj en la okuloj. La edzo je ĉi tiu fojo nenion diris, elviŝis la larmojn, ĝemis profunde, leviĝis kaj preninte sian solan batalilon, bastonogon, kaj kruĉon de akvo, elkuris el la « samannik », kiel li estis, — duonnuda kaj sen ĉapo.

Kien iri? La luno per siaj malvarmaj radioj lumigis la tutan vilaĝon. Sed ĉu li trovos iun, kiu komprenos lin? Dum momento li forgesis, por kio li staras tie ĉi. Kaj pensoj transportis lin tien, al la hejma dometo, al la karaj kampoj. Ekvidis li sian malgrandan Marto'n, sian ruĝvangan Naso'n.

Ĉi tiuj malvivuloj restis tie...

— Guteton da lakto! — eksonis ree en liaj oreloj. Li ektemis; estis necese trovi lakton.

Li aliris al la unua pordo, malantaŭ kiu loĝis maljuna vidvino. Li haltis apud la pordo kaj pensis:

(1) En Azia Turkujo, proksime de Kaŭkazo. (2) « Samannik » estas malgranda konstruaĵo el ligno kaj argilo.

ekfrapi aŭ ne? Kaj se oni eliros kaj ekinsultos min...
Ja, li estis enmigrinto!

— Guteton da lakto!

Tiuj ĉi vortoj persekutis lin. Ja, tia estas la lasta deziro de lia infano. Li forgesis la timon, la honton kaj ekfrapis la pordon.

Ekaŭdiĝis forta bruego de la pordoj kaj komuna bojo de hundoj.

Li ekfrapis alian fojon. Fine en la korto montriĝis maljunulino.

— Kiu estas tie? demandis ŝi.

— Mi, avineto — ekaŭdiĝis, ekstere, la respondo,

— Armeno, kristano, gaktakan'o, malfermu, pro Dio, la pordon.

La maljunulino malfermis la pordon kaj ekvidinte nudan viron, sen ĉapo, ekkriis pro timo, rapide ekfermis la pordon kaj ekkuris.

Nur tiam la malfeliĉulo ekvidis sian nudecon kaj teruran vidaĵon.

Tremo trakuris lian tutan korpon. Ĉu efektive li eksentis la malvarmon? Kelkatempe li staris kvazaŭ tetaniĝantaj ka; subite rekonsciiginte kaj ektiminte, ke ĉe la bruo povos kunveni homoj kaj ekpensi ke li estas ŝtelisto, la malfeliĉulo kuris alian flankon. Lia situacio estis tre terura. La vento balancadis liajn ĉifonaĵojn kaj diskonfuzitajn harojn. De ĉiuj flankoj furiozaj hundoj ĉirkaŭis lin. Li apenaŭ sukcesis defendi sian nudan korpon kontraŭ ili. Kaj starante dorse al la muro kaj daŭrante defendi sin, li, ne longe pensante, ekfrapis la unuan pordon. Sur la sojlo ekmontriĝis viro.

— Iaman (ho! ve), frato! Mi estas kristano kaj alvenis el sangavida lando; infano mia estas en antaŭmorta agonio kaj deziras guteton da lakto, faru, pro Kreinto, ion... En la pasinta jaro, en tiu ĉi

tempo ni havis ankaŭ multe da bovinoj, nun ni estas seniĝintaj je ĉio kaj bezonegas guteton da lakto.

La peto estis tuŝanta, la pentraĵo estis terura. La vilaĝano alportis kruĉon da lakto, kaj ĝin donis al li. La malfeliĉulo ekrapidis al la samannik'on. Li, kiel pri la plej kara aĵo, zorgis pri ĉi tiu senvalora fluidaĵo akirita tiel malfacile. Li flugis antaŭen, uzante la lastan forton de siaj laciĝintaj piedoj. Sed li, ne estante jam atinginta la « samannik'on », ekaŭdis en la nokta kvieteco korŝirantan krimon de l' edzino.

— Iaman lalo, Iaman lalo!... (1)

Li rigidigis. Nun estas klare, ke finiĝis la lasta akto de l' terura tragedio...

Li rapidigis siajn paŝojn kaj jen, li estas ĉe la sojlo de la « samannik »...

— Iaman lalo, Iaman lalo!... kriadis la edzino, ekkaptinte siajn harojn. Sur ŝiaj genuoj dormis per eterna, trankvila dormo, tiu malgranda kreitaĵo, kiu tiel malmulte vivis en la malbeninda mondo, kaj tiel multe vidis, eksentis kaj suferis.

La malfeliĉa patro iom staris sur la sojlo, kaj kun senfina malĝojo rigardis sian edzinon kaj sian mortintan infanon. Ektremis liaj manoj, falis la kruĉo, kaj la blanka fluidaĵo disfluis sur la ekŝiminta tero. Li forjetis flanken sian bastonegon, surfalis la malvivulon, kaj tiamaniere ekploregadis, ke aŭdante lin, eĉ sekkora homo, ektemus.

Tio estis malkvieta esprimo de superfluenta incitado kaj malespero, elsaltanta el animo, plena je neelportebla malĝojo kaj suferado.

Sed la luno daŭris briladi kaj lumigadi tiujn ĉi malfeliĉajn aferojn de malbonega sorto.

Ho! ve! kion ĝi ne lumigas!...

G. DAVIDOV.

(1) Ho! ve! la infano, Ho! ve! la infano!

La ora Ŝlosileto.

La suno, malrapide, malaperis; la konfuza senlumeco estis anstataŭinta la taglumon; dolĉa muziko de malproksima sonorilaro, agrablege lulis min; miaj palpebroj plipeziĝis, kaj fine mi ekdormis.

Ho, kia mirinda vidaĵo tiam prezentigis al mi. — Delikate portata per blankaj flugiloj, alvenas ravega feino; oraj bukloj ĉirkaŭas ŝian belegan vizaĝon; blanka, diafana vualo, kovras ŝian graciosan korpon; kaj kiel nubo, ŝi forflugis. — Longe mi restis kun tiu ĉi kortuŝanta impresio; de longa tempo la mistera feino jam malaperis, kiam mi ankoraŭ estas ŝin serĉanta per rigardo. — Ho, mi volus eterne ŝin sekvi!

Igante pli kvietaj, mi ekvidas, apud mi, verdan kesteton; ĉiuflanke mi ĝin turnas, por eltrovi la seruron; fine mi ekvidas, en angulo, malgrandan risorton, kiun mi premas. — Tuj la kesteto malfermiĝas, kaj mi elprenas el ĝi oran ŝlosileton.

Apenaŭ mi ĝin ekprenis, kiam disigis parfuma rozarbetaro, vidigante al mia mirigata rigardo, ĉielan anĝeleton; preskaŭ ne tertuŝante, li pli proksimiĝas, kaj prenante mian manon, li dolĉe min fortiras. Nekonscia, mi lin sekvas, kaj baldaŭ ni alvenas antaŭ grandan feran pordegon ornamitan per du kolosaj ŝtonaj leonoj; instinkte mi provas uzi la ŝlosileton, kaj, ho miraklo! la pordego malfermiĝas, kaj tuj mi estas ĉarmita per admireginda vidaĵo: marmoraj fontanoj disĵetas brilegajn pluvetojn; ĝoje kantante, multaj birdetoj flugas de branĉoj al branĉoj.

Pli malproksime, ĉirkaŭita per densa hederaro, aperas imponanta kastelego — kaj ĉiam ni daŭrigas nian senfinan iradon.

Ĉiuj pordoj malfermiĝas per mia mirakla ŝlosileto, nenia estas kontraŭstaranta. — Tiel mi intersekve trapasis ĉiujn landojn: la belegajn pejzaĝojn de la riĉa Germanujo, la vastegajn kamparojn de la spacaj Rusujoj, Ĥinujon, Japanujon, kaj la Amerikan landaron, por reveni tra Anglujo. Ne ĉie mi vidis elmontraĵojn de ameco kaj frateco; disputoj kaj militadoj disigis la homojn; ĉu estis ĉiam tiel gravaj, ne-traireblaj profundaj, kiujn neniu ponto povus unuigi? Ne

ĉiam; ofte nur ne sufiĉe klaraj statoj, malkomprenitaj sciigoj, neĝuste transdonitaj, kaj pli kaj pli aliigitaj per intersekvaj tradukoj sufiĉis por ekklamigi popolojn kiel per bombeksplodo.

Mi vidis la komercon kaj industrion neobligatajn per la diverseco de lingvoj, mi vidis milionojn da homoj vane klopodantaj por malfermi la serurojn de la fortikaj disigiloj ĉe la multnombraj landlimoj, kaj mi, dank' al mia malgranda ŝlosileto, mi bezonis apenaŭ tuŝi la pordojn por tuj ĉien eniri, kaj ĉie mi estis akceptata egale ĝentile, kaj ĉiuj min konsideris kiel longdatan konaton. — Post tio ĉi mi havis nur unu deziron: danki la fejon pro ŝia multpoviganta donaco; mia bonvola kondukanteto, konsentante plenumi mian peton, alvokas per speciala signalo, du dresitajn cigojn; tuj ili nin konprenas sur siaj dolĉaj dorsoj, kaj malmulte poste, mi estas feliĉa, revidi ilian ĉarman estrinon, la ĉielan fejon; melankolie kuŝante sur velura kanapo, malĝoje ŝi revadas; je mia alveno ŝi ekstarigis, kaj estas tre kortuŝata per mia dankemeco; du larmoj pro kontenteco malsekigas ŝiajn palajn vangojn, kaj iomete rekuraĝiginte, ŝi tiel ekparolas: — « Ĉu ĉia espero ne estus ankoraŭ vana, kaj estus eble, ke iam mia deziro plunumiĝu? Mi celas ja nur feliĉon por la tuta teranaro, sed la homoj estas malfidemaj, kaj malakceptas miajn bonfarojn. Ĉiutage, po miloj, mi disĵetas ŝlosiletojn, kies kvalitojn vi ŝatas tiel ĝentilege, kaj preskaŭ ĉiuj kestetoj revenas, ne malfermitaj. Mi rezervis, diferencigante nek rangon, nek aĝon, al ĉiu homo, po unu kesteto, kaj, ho ve, mi posedas ĝis nun, preskaŭ tiom da kestetoj, kiom mi preparigis.

Kvankam mi bonege konsciis la ĉagrenon de mia bela bonfarantino, mi trovis nenan vorton por ŝin konsoli; la fakto estis verega, tio estas fatalo de ĉia noveco. — Kaj mi silentis.

Diru, amiko, ĉu vi ne deziras oran ŝlosileton? Aŭ ĉu vi dubus pri tio, ke nia kara lingvo estas tiel multvalora ora ŝlosileto?

Fantaziaĵo de EUGÉNIE GUNZBURG
el Antverpeno (Belgujo).

Edinburgh.

Originale verkita de W. M. PAGE (Skotlando).

Edinburgo, la ĉefurbo de Skotlando, posedas ĉarman situacion, kiu metas ĝin inter la plej belaj urboj en la mondo. Konstruite sur kelkaj montetoj, ĝi estas iaforte nomata « modern Athens » pro sia simileco al la antikva ĉefurbo de Grekujo ; kaj iaforte « Auld Reekie » (malnova enfumiginto) pro la nebulo, kiu kelkfoje leviĝas super ĝi el la kamentuboj de la domoj. La nomo « modern Athens » ankaŭ taŭgas bone, ĉar Edinburgo estas urbo tre fama pro la lernado. Ĝia Universitato kalkulas ĉirkaŭ 3000 studentojn, kaj la kolegioj kaj altlernejoj allogas lernantojn el ĉiu parto de la mondo.

La eksteraj muroj de la domoj en la urbo estas preskaŭ ĉiam konstruitaj el griza ŝtono, kiu donas al la urbo ĝenerale malhelan, malvarman aspekton, sed, interne, la domoj estas grandaj, varmaj kaj komfortaj, kaj iliaj loĝantoj, kiuj ŝajnas ekstere malhelaj kaj malvarmaj kiel la domoj, en la koro estas varmaj, amindaj kaj tre gastemaj.

Edinburgo havas grandan fierecon pri sia situacio, kaj prave, ĉar kiu povas forgesi tiun belan vidadon, Princes Street (Strato de la Princo), unu el la plej belaj stratoj en Eŭropo ; je tiu flanko staras grandaj kaj gravaj konstruaĵoj, hoteloj, magazenoj, klubejoj,

k. t. p., je ĉi tiu flanko, vasta valo kun verda herbaĵo kaj arboj kaj floroj, kaj ĉe la ĉiellinio oni vidas altan ŝtonegon kronitan per la malnova kastelo, la antikva hejmo de la reĝoj de Skotlando, nun soldatejo. Jen, malsupre de la deklivo de la kastelo, la malnova urbo, la « reĝa mejlo » — la fama strato de la kastelo al la Palaco de Holyrood (Sankta Kruco).

Ni supreniras al la kastelo. De la baterio ni elrigardas. Kia mirinda pejzaĝo etendiĝas antaŭ la okuloj, plena je mil detaloj plej interesaj ! Kuŝas je la piedo de la urbo, jen monumento, jen turo de preĝejo aŭ glora kolegio. Malproksime oni vidas la riveron Forth, kiu etendiĝas de la grandaj montoj okcidente al la maro, orienten. Jen en la malhela malproksimaĵo la montoj de la Altlandoj — la grandaj « Ben » oĵ de la nordo....

La spirito revas. Oni vidas ŝipon kun blanka velaro, marveturantan el Leith, kies havenon ni rimarkas apude. Tiu ŝipo portas junan kaj belan princinon, l' esperon de Skotlando. Adiaŭ, bela princino ! Pasas la jaroj. Alia ŝipo alvenas al tiu haveno kaj revenas la princino, nur dek ok-jara, sed jam vidvino, vidvino de la reĝo de Francujo. Ŝi revenas preni la sceptron, surmeti la kronon de Skotlando. Ŝi loĝas en la kastelo, kie ni staras,

ankaŭ en la Palaco de Holyrood, kie ŝi pasigas multe da malfeliĉaj tagoj. Malĝoje, nekomprene, ŝi kontraŭbatalas, malforta virino inter fortaj viroj. Ni vidas ŝin irantan en la Katedralan Preĝejon de Sankta Giles por aŭdi la predikon de la konata Johano Knox, ŝia plej pasia kontraŭulo. Post jaroj de batalado, kaj flugado de loko en lokon, forpelita, tedita, lacigita, ŝi eniras Fotheringay kastelon en Anglolo, kie laŭ la ordono de ŝia ĵaluza kuzino, Reĝino Elizabeto de Anglolo, oni senkapigas ŝin.

Pasas la jaroj, kaj la epokoj de l' batalado, de l' perforto, de l' persekutado. Leviĝas granda hela epoko de literaturistoj, verkistoj, poetoj, filozofoj, kaj la mondo ehoas la nomojn de Sir Walter Scott, David Hume, Adam Smith, De Quincey, Robert Burns, Thomas Carlyle kaj Robert Louis Stevenson.

Tiaj estas la memoraĵoj kiujn Edinburgo alvokas — memoraĵoj tre karaj al ĝiaj urbanoj — kiuj ĵetas ĉirkaŭ la scenejon, romanatan atmosferon.


Krom la romana flanko, Edinburgo estas la sidejo de gravaj industrioj. Oni trovas ĉi tie, pli multe da presmaŝinoj ol en ia urbo krom Londono ; de ĉi tie devenas la grandaj enciklopedioj — la *Encyclopædia Britannica*, la enciklopedioj

de Chambers, Harmsworth, k. t. p. ; oni ankaŭ trovas grandajn fabrikejojn de kaŭĉukaj komercaĵoj ; bierfarejojn ; tipfandegojn kaj biskvitbakejojn.

Edinburgo estas la sidejo de la superegaj juĝejoj de Skotlando, ĉar Skotlando posedas leĝan sistemon apartan de tiu de Anglujo ; kaj oni trovas ĉi tie la oficejojn de la Skota nacia administracio. Antaŭ du centjaroj Skotlando havis sian propran parlamenton, sed en 1707 okazis la unuiĝo de la parlamentoj de Anglolo kaj Skotlando, kaj de tiu tempo la skotaj membroj de la parlamento kunvenis en la Britan parlamentejon de Londono.

En 1908 okazos en Edinburgo, Skota nacia Ekspozicio, kaj la alilandaj Esperantistoj kiuj vizitos la Francan-Britan Ekspozicion en Londono en tiu jaro bone faros veturante norden al Skotlando, por viziti la Ekspozicion en Edinburgo, kie ili ricevos varman akcepton de la Skotaj esperantistoj, kiuj aranĝos specialan gastejon, kaj elmontrejon de esperantistaj aferoj. Iu, kiu dezirus elmontri en ĝi esperantistajn librojn, komercaĵojn, aŭ specialaĵojn devas turni sin al S^{ro} Alexander Fasson, 50, Queen Street, Edinburgh, esperantista konsulo, kiu afable donos ĉiun sciigon.

W. M. PAGE.
el Edinburgo.



EDINBURGO. STRATO DE LA PRINCO.

Annama Teatro.

La Kolonia Ekspozicio en Marseille donis al multaj Okcidentanoj malofitan okazon por vidi dramojn de l'annama literaturo, prezentatajn originale de annamaj aktoroj. Tiuj ĉi estas mirinde konsciaj, sed ilia naturismo tiel diferencas je la nia, ke necesas kutimiĝo por kompreni bone eĉ gestojn. La lingvoj, la psikologio de tiuj orientaj popoloj, tiel longatempe apartaj, iliaj tradicioj estas tiel malproksimaj je ni!

Nenio povas esprimi la impreson strangecon, kiun oni sentas, vidante unuafoje annaman dramon. Tiu idiomo konsistanta el unusilaboj elparolataj laŭ ses tonoj, kaj nuancoj neaŭdeblaj je niaj oreloj, tiu patosa deklamado, kiu similas katblekadon, tiu senĉesa muziko, kiu konsistas preskaŭ nur el ritmaj plaŭdoj, ĉio nin mirigas strange. Kaj tio ĉi mem ne estas mirinda, ĉar, se, per ia miraklo, ni povus ĉeesti ĉe ia teatra prezento de l' jarcento de Ludoviko XIVa, verŝajne kaj kredeblege ni ne estus malpli mirigitaj.

L'annama teatro ŝajnas spegulo de antikva epoko, kies tradicioj, kutimoj, interkonsentoj malplifortigitaj en la nuna vivado ordinara, persistas ĉe la scenejoj.

La prezentitaj dramoj ne estas senĉarmaj kaj neŝatindaj. Kiel la « Mystères » (religiaj dramoj) mezepokaj, ili nin transportas facile de Tero en Ĉielon aŭ Inferojn; kaj la kono pri la tiea mitologio kredeble estas granda helpo por ilia kompreno.

Jen estas l' analizo de unu el tiuj dramoj, la « *Malfidela Edzino* »:

Sub la dinastio de la *Tân*-idoj, intermilitista konkurso estis fondata de l' reĝo, kiu volis elekti la plej bonajn militistojn. Li-thuân sin prezentis kaj ricevis l' unuan premion. La reĝo komisiis al li mision en malproksima provinco de Hinujo.

Li-thuân, antaŭ ol foriri, komisiis zorgi pri sia edzino LjenNgok-Uah kaj sia filo Li-Njân al unu el siaj intimaj amikoj nomita Biĉ-hô. Sed tiu ĉi lasta ne zorgis pri la tasko al li komisiita. Iu, nomita Li-hoa, profitis tiun kulpan maldiligenton, kaj enigis sin en la hejmon de l' forestanto, kaj amindumis lian edzinon.

Timante, ke ilia kulpo poste denunciĝus la gekulpuloj decidis forigi la junan Li-Njân. Li-hoa lin enkondukis en arbaron, ligis lin al arbo, kaj lin lasis.

La knabeto ektimis, vidante subite tigron, kiu antaŭ li saltegas. Sed la besto, anstataŭ manĝegi la knabeton, kuŝigis lin sur sian dorson, kaj alportis lin en lian patrodomon.

Li-thuân revenis el sia vojaĝo, kaj petis pri sia filo. LjenNgok-Uah, komprenante sian kulpon baldaŭ malkaŝotan, prenas glavon kaj provas mortigi sian edzon dum lia dormado. Sed, subite aperante, la Terspirito maldirektigas la kriman armilon.

Vekigante, Li-thuân petas klarigojn, sed vidante la junan Li-Njân'on alportatan de tigro, li svenas pro surprizo kaj timo. Lia filo rakontas al li tion, kio okazis dum lia forestado.

Konvinkite pri la malfideleco de sia edzino, Li-thuân prenas l'armilon, kiu estis lin minacinta, kaj mortigas la kulpulinon.

LjenNgok-Uah malsupreniris en Inferojn. Sed, antaŭ la Juĝistoj, ŝi ĵetis la tutan respondecon de sia kulpo sur sian kunkulpulon Li-hoa'on. La juĝistaro ordonis do, ke la malbonaj spiritoj mortigu tiun ĉi lastan, por ke oni povu juĝi lin samtempe kun LjenNgok-Uah. Tio fariĝis tuj.

Nu, la juĝistaro malrajte estis tiel aginta, ĉar, laŭ la Mortlibro, Li-hoa estis ankoraŭ dek jarojn vivonta sur Tero. La Terspirito redonis do al li la vivon. Sed, ĉar lia animo eraranta ne povis plu reeniri en korpon enterigitan, oni ĝin loĝigis en kvazaŭhomon, kiun oni kondamnis servadi, dum dek jaroj, kiel vartisto, la junan Li-Njân'on.

Ĉu ne estas vere, ke tiu ĉi dramo valoras multajn aliajn okcidentajn.

JULIO CONTENCIN.

« Opero » de Monte-Carlo en Berlin.

De multaj jaroj « Opero » de Monte-Carlo estas fama tiom

pro la prezento de kutimaj ĉefverkoj kiom pro la kreo de tiel brilaj tiel nombraj de novaĵoj. La serio teatra kiun ĵus prezentis la lireca trupo de Monte-Carlo ĉe l' operejo de Berlin ne nur estis triumfo de la artistoj kaj verkistoj, sed ankaŭ bela elmonstro de l' povo de Arto por unuiĝo de l' koroj. La preskaŭ tutan profiton de tiu muzika festeno Francujo ricevis, iamaniere tial ke la sumo kolektita estis difinita por projektita franca hospitalo, sed precipe pro l'entuziasma akcepto de francaj verkoj.

La festaro komenciĝis per « *Damno de Faust* », teatre alfarita de Marcel Gunsbourg, antaŭ eminenta ĉeestantaro, la imperia familio kaj kortego, princo de Monaco, kaj la berlina supraburgaro. Ludata de S'oj Rous-selière, Renaud, Chialpine, F'ino Lindsay, la Berlioz'a verko fortege impresis. La morgaŭa vespero alkondukis *Mefistofele*, de Boito, kun la dirita rusa basulo en la Diabla rolo. Poste *Don Carlos*, de Verdi, entuziasme aplaudata estis dank' al la kantantaro, S'inoj Deschamps Jehin, Brozio, S'no Bouvet kaj la nomitaj artistoj. *Theodora*, poste, kunigis por tiu brila publiko, la dramatan intereson de l' *Sardou*'a verko (tre konata en Germanujo) kaj la povan esprimemon de X.Leroux, ĉefprezentanto de l' juna

franca verkistaro, kaj ricevigis al F'ino Heglon, perfekta ludkaj kantistino, kaj al la verkinto, kiu komandis la orkestron, belegan sukceson. La solenega (gala) prezento, kiu finis la festaron, enhavis fragmentojn de *Samson et Dalila* (F'ino Heglon) kaj *Hérodiade* (F'ino Grandjean) de majstroj Saint-Saëns kaj Massenet; tian honoron Opero de Monte-Carlo ŝuldis al tiuj verkistoj, kies ĉarmajn verkojn ĝi eldonis la unua, nome Helen'on, Chérubin'on, la jongliston de Notre-Dame, kaj kiuj nuntempe laboras por la fama scenejo de la lazura marbordo.

Neeble priskribi la entuziasmon de la berlina publiko skuata de l'arta sentego en tiuj liraj festoj. La imperiestro, kiu ĉeestis en ĉiuj vesperaj kunvenoj, malŝpare montris sian admiron al la franca arto okaze de tiuj prezentoj; li disdonis ordenojn kaj akceptis, kiel kunmanĝantojn, ambaŭ eminentajn francajn verkistojn.


E. BACQUET.

« Salome », de Richard Strauss, en Parizo.

Dum la Maja monato okazis en Parizo germanlingvaj prezentadoj de *Salome*, la lireca dramo de Richard Strauss, unu el la majstroj en la nuna muzika arto, laŭ paroloj de la angla poeto Oscar Wilde. Ni donas ĉi supre la portreton de l' muzikisto, kies verko estas fama en la tuta mondo.



RICHARD STRAUSS.





Interŝanĝo internacia de infanoj kaj gejunuloj.

La fakto ke mi ricevis dum la lastaj monatoj kelkajn demandojn de francaj esperantistoj serĉantaj interŝanĝon de siaj infanoj aŭ fratoj instigas min diri hodiaŭ kelkajn vortojn pri tiu grava afero.

En 1903 S^{ro} Toni Mathieu, 36 Boulevard Magenta, Paris, fondis oficejon de internacia interŝanĝo de infanoj kaj gejunuloj; verko plene pacifista kaj nobla, kiun la franca registaro tuj rekompencis donante al li la « Palmes académiques ». Ĉar mi mem restadis preskaŭ 11 jarojn en fremdlando (Francujo, Anglujo, Belgujo, Italujo kaj Svisujo), mi taksas des pli bone la grandegan valoron de tiu ĉi afero, ĉar mi kredas ke ne povas ekzisti pli bona rimedo por la alproksimiĝo de la diversaj nacioj kaj popoloj ol tiu ĉi interŝanĝo kiu estas certa la plej bona semado por pli bona estonteco. La konata prof. Charles Richet jam antaŭ multaj jaroj konstatis tion kaj skribis: « Per la interŝanĝo la naciaj antaŭjuĝoj estas detruataj; ni pensas ĉiam ke je la alia flanko de niaj landlimoj ekzistas friponoj kaj malsaĝuloj; dum la loĝantoj de tiuj ĉi landoj pensas la samon pri ni. » « Mi ankaŭ devas konfesi, ke dum mia restado en la liceo oni ĉiam diris al mi: Rigardu ĉiam la Francojn kiel malamikojn heredajn » kaj mi estas preskaŭ la malamon kontraŭ alilanduloj kaj diri al ili, kiel faris antaŭ kelkaj semajnoj protestanta pastro de nia urbo: « La milito estas puno de Dio, kiu volas ke ĝi ĉiam ekzistu » Tamen Jesuo diris: Amu vian proksimumon kiel vin mem. Kia diferenco! — Mi permesas al mi doni al la legantoj de T. 1. Mondo kelkajn tradukaĵojn de leteroj adresitaj al S^{ro} Mathieu: Pariza liceano (18 jara) skribas:

Mi memoras la 2 monatojn pasigitajn en Elberfeld plej bone, kaj neniam forgesos tiun ĉi liberecon utilan kaj agrablan, kiun mi ŝuldas al la interŝanĝo. Mi povis lerni fremdan lingvon en la lando kie oni parolas ĝin kaj mi ĉiam vivis kiel en mia propra familio. — Lernisto de lernejo Colbert (15 jara) skribas la saman pri Bavarujo; ambaŭ infanoj estis tiel bone en la reciprokaj familioj ke oni longigis dum kelkaj monatoj la interŝanĝon. Similan leteron skribas alia franca junulo pri sia interŝanĝo en Anglujo kaj German-

ujo. Alia « interŝanĝito » proponas interŝanĝi dum unu tuta jaro lerneja. Germano skribis jene al S^{ro} Mathieu: mi estas tute mirigita per via plenseca organizo. — Centra oficejo kiel la via ne havas similan en la tuta mondo. Mi deziras nur ke oni diskonigu internacie vian sistemon. Mi volonte helpos vin en via entrepreno. — La jam nomita S^{ro} Prof. D^r Richet plie diras: Ne ekzistas pli senseca antaŭjuĝo ol tiu de malestimo en kio oni tenas la fremdlandanojn. Por kontraŭbatali tiun malbenitan eraron nenio valoras la vivon familian en alia lando. La interŝanĝo internacia estas do la idealo por atingi trioblan rezulton: 1. Lerni fremdan lingvon en fremda lando. — 2. Instrui sin mem per la vojaĝoj. — 3. Koni vere la aliajn popolojn kaj vivi ĉe ili kiel hejme.

La 12 an de Februaro (1907) okazis en Parizo la jarkunveno de la I. S. p. I. I. d. inf. kaj gej. sub la prezido de S^{ro} P. Baudin, antaŭa ministro de konstruaĵoj. Dum la pasinta jaro 120 francaj infanoj estis interŝanĝitaj, el kiuj 97 kun Germanujo, 6 kun Aŭstrujo, 14 kun Anglujo kaj po 1 kun Italujo kaj Hispanujo. De la komenco de la societo (1904) oni interŝanĝis 255 geinfanojn. Bedaŭrinde nia amiko S^{ro} Mathieu ne estas jam esperantisto, sed eble li fariĝos tia. Mi nur povas esprimi al tiu ĉi sinjoro miajn plej korajn gratulojn pri lia nobla elpensado kaj petas la diversnaciajn esp. helpi lin kiel eble plej multe diskonigante ĉie ĉian aferon kaj organizon. Tiamaniere ili helpos al unu el la plej gravaj verkoj de la tuta mondo kaj preparos la efektivigon de la granda sentenco: Amu vian proksimumon kiel vin mem.

C. BARTHEL,
Vicprez. de la Frankfurta grupo.



GRUPOJ EL FRANCAJ KAJ GERMANAJ INTERŜANĜITOJ.



Legendo Burgundia

Oranĝujaj Floroj

MAJA RAKONTO.

Iam la noktigo envolvis ĉiujn objektojn per siaj vualoj faritaj el ombro densa kaj mistera silento.

Sed, ne atentante pri la grandiganta senlumeco kaj la aŭtuna malvarmeco eniranta en la vastan ĉambron de la kastelo, Aliso de Voulaines staradis apud la malfermita fenestro, esplorante per sia malkvieta rigardo la horizonton, kiun ekokupis la nebulego.

Alvokita al la militistaro de sia landsinjoro, antaŭ sep monatoj ŝia fianĉo devis forlasi ŝin kaj ĉiutage, de lia foriro, Aliso sidigis en la alta turo, antaŭ la fenestro de kie oni vidas, tiel malproksime kiel la okuloj povas rigardi, la vojon sur kiu ŝia dolĉa kavaliro estis forrajdinta, kaj sur kiu li revenos.

Sed, tra la nokto pli kaj pli senluma, ŝi videtis nur la nigran mason de la arbaro, kaj, stariĝante malĝoje, ŝi direktis sian rigardon al la edziniĝa tualetu kuŝanta sur ŝia lito kaj preparita antaŭ longaj tagoj por ŝia proksima edziniĝo. Kaj subite ekkaptata de timo nedifinebla, Aliso tuj ploris la larmojn, kiujn espero ĉiutage plimalgrandigita detenis ĝis nun.

Siaj ploroj falis sur la vualon kaj la kronon de oranĝujaj floroj, kiu, ve! eble neniam ornamos ŝian frunton...

Kaj jen dolĉega, delikata parfumo ekdisiĝis en la ĉambro, kiel balzamo sur ŝia doloro.

Ĉiu floro de la krono malfermiĝis kaj distilis siajn bonegodorojn. Tuje la iamaj paroloj enigmaj de sorĉistino alvenis al ŝia memoro: « Cia amo, ŝi estis dirinta, floros kaj bonodoros post ciaj larmoj; kiel oranĝujaj floroj post pluvo ».

Rekuragiĝante, Aliso ne plu dubis, ke ŝia karega fianĉo estas sur la reira vojo. Ĝojanime, ŝi ordonis, ke la palaco estu iluminata kaj flagornamata kiel en festotago, kaj, vestiginte sin per la blanka edziniĝa ornamajo, la tutan nokton ŝi atendis, dum la mensestrolo (*mezepoka kantisto*) karese kantis pasiajn romancojn.

Unua rozkolora eklumo aperis sur la ĉielo. Ŝi residiĝis je la kutima loko, en la alta turo, rigardante al la longa, rekta vojo.

Unu, du horoj pasis; neniu aperis... Sed — ĉu ŝi ne ekaŭdas ĉaskornan sonon? Ĉu ŝi ne ekvidas moviĝantan punkton? Kiu antaŭen iras? Ŝia koro batas rompiĝe. Nun, ŝi rekonas la flamforman flagon de sia fidela kavaliro. Estas li! Estas li!...

Ilia edziĝo estis festata la saman tagon. Ĉiuj kastelmastroj najbaraj alkuris pro tio, sed multaj nobelaj fraŭlinoj estis ankoraŭ atendantaj sian fianĉon foririntan al la milito, kiel tiu de Aliso de Voulaines. La nova, feliĉa edzino estis fidinta al sia mirinda krono el oranĝujaj floroj kvazaŭ ĝi estus talismano. Al ĉiu el siaj amikinoj fianĉinigitaj, ŝi donacis po unu el ĝiaj bonodoraj floroj.

Kelkajn tagojn poste, iliaj amataj kavaliroj revenis kaj iliaj edziĝoj estis festataj ĝojege.

De la miraklo de l' oranĝujaj floroj de la nobela Aliso de Voulaines, la fraŭlinoj, kiuj ĉeestas ĉe la edziniĝo de siaj amikinoj, ne forgesas depreni unu floron oranĝujan el ilia krono, por ke ian proksiman tagon, venu la Princo Ĉarma, kiun ili amos ĉiam.

Originale verkita kaj ilustrita por « TRA LA MONDO »

de ODILINO PRUDENT,

el Paray-le-Monial (Francujo).



NAIVECO.

El COELHO NETTO, verkisto kaj akademiano (BRAZILUJO).

Kiam doktor' Anselmo trapasis la ponton, dormetante, rajdante sur malrapida azeneto, Francino sin metis antaŭ lin.

— Mia bona doktoro...

Pro la subita halto de la besto, la maljunulo preskaŭ falis de ĝi. Li malfacile sin ekvilibris, kaj, tre malfermante siajn okulojn por rigardi la knabineton, severe demandis:

— Kiel! kion vi faras sur la vojo, vagistino?

Francino, tre ĝenata, mallevis la okulojn kaj komencis tordi la ekstremaĵojn de sia eluzita antaŭtuko.

— Ĉu vi jam estas laca kuri tra kanaroj kune kun la knabaro? Foriru de ĉi tie! Lasu min pasi!

Sed la humila knabineto, tordante ĉiam la ekstremaĵojn de la eluzita antaŭtuko, levis al la maljunulo siajn petegajn okulojn.

— Kion vi volas? Diru!

— Mi volus, bona doktoro...

— Nu! Diru senembarase!

— Mia patrino mortis hieraŭ, kiel la bona doktoro scias; ŝi mortis lasante la malgrandan Julon, kiu ankoraŭ suĉas...

— Jes... Sed kien vi volas alveni? Ĉu vi volas iom da mono?... Jen estas.

Kaj li ĵetis al la knabineto du arĝentmonerojn.

— Ne estas mono tio, kion al vi mi petas, doktoro...

— Nu, do, kio estas? Diru!

Francino, tre ruĝa, ŝanceliĝa, malbutonumis sian palton, malbutonumis sian dikan ĉemizeton, kaj montris siajn virgajn mamojn — du puregajn burĝonojn de magnolio, sur kiujn estas surĵetita unu paro

da ruĝaj abeloj — kaj, parolante al la doktoro, kun petega mieno, diris:

— Ĉu la doktoro vidas? Mi havas mamojn, kiel ĉiuj virinoj. Tamen mia frateto ilin senprofiĉe suĉas: la lakto ne fluas... Ŝajnas al mi, ke tio okazas pro tio, ke ili estas fermitaj. Mi volus...

— Kion, malgrandulino?

— ...ke mia bona doktoro ilin boru.

— Ne! Ne tio, knabino! Aŭskultu, diris la maljunulo kortuŝita, portu vian frateton ĉe min, mi lin prenos, ĉu vi aŭdas? Sed ne pensu bori viajn mamojn, malsaĝulineto! Tio estas kiel ovo: post la fruktoporto tio, kio estas interne penas eliri per la sola helpo de sia propra forto... kiel la kokidetoj. Ĉu vi vidis iam naskiĝi kokideto?

— Jes, doktoro, mi jam vidis.

— Ĝi mem pinĉas la ŝelon, ne vere?

— Ja, doktoro.

— Estas tiel, ĝuste, pri la lakto.

Kaj, ridetante, li donis unu klakon sur unu el la vangoj de Francino:


— Vi estas ankoraŭ tre juna... Ne pensu plu bori viajn mamojn... kaj, pri Julio, mi rediras, mi lin prenos... Ne zorgu pri li... ĉu vi aŭdas?

— Jes, bona doktoro.

Kaj doktor' Anselmo, viŝante unu larmon, spronis la beston, kaj ekiris balbutante, dum la naiva knabineto, starante meze de la ponto, enfermis siajn virgajn mamojn, butonumante la dikan ĉemizeton.

Tradukis DALTRO SANTOS.

Rio de Janeiro (Brazilujo).



La Haveno La Rochelle. — La Sardeloj.

Tiu ĉi fotografajo prezentas fiŝkaptajn ŝipojn ĵus revenintajn al la haveno.

De kelkaj jaroj la sardeloj ŝajnas iom forlasi la marojn de okcidenta Francujo, kiujn ili antaŭe tre regule vizitadis en la someraj monatoj.

Tro ofte nun la fiŝkaptistoj veturas hejmen kun malplenaj barkoj. Tial, tuj kiam kelkaj el tiuj ŝipetoj alvenas en La Rochelle ŝarĝitaj per la arĝentecaj kaj bongustegaj fiŝoj, tiu novaĵo rapide diskonigita kunvenigas sur la kajon la tutan fiŝvendistinaron.

Ĝenerale la ŝipestro restigas sian barkon je kelkaj metroj de la bordo dum la marĉandaj diskutoj ofte longaj kaj ĉiam bruaj; ĉar la fiŝistinoj senmodere laŭtigas la voĉon por pli bone akceptigi siajn proponojn.

Nur kiam oni jam interkonsentis pri la prezo, la ŝipo albordeĝas; la sardeloj estas liverataj kaj tuj disportataj en larĝaj plataj korboj. La fiŝistinoj rapidas al la urbo; ĉar la unue alvenintaj povos pli profite revendi sian komercaĵon.

Ŝajnas, ke la marĉanda kriado neniel lacigis iliajn pulmojn; ĉar tra la stratoj iras nun, kiel forta voko, iliaj surdigantaj anonckrioj: « Fricassée, fricassée, à frire, à frire ici! » (Fritaĵo, fritaĵo, jen la fritotaĵo!).

Tion aŭdinte, la kuiristinoj aperas sur la sojlo de siaj domoj por aĉeti la delikatan manĝaĵon, ĉiam tre ŝatatan de la frandemuloj.

SAM. MEYER

el La Rochelle (Francujo).

De Hispanujo en Senegalujon per fervojo de Francis Marre.

Markizo de Camarasa elpensis kaj preparis, almenaŭ en ĝiaj ĉefaj trajtoj, bonegan nekomunan projekton, kiu konsistas el la kreo de fervojo komunikiganta Dakar kun Ceuta per Senegalujo, la Okcidentan bordon de Sahara kun Maroko. La unua parto de tiu ĉi fervojo ekzistas de Dakar ĝis St-Louis; restas do tri partoj konstruotaj: unu franca; la alia hispana ĝis la alto de Cap Blanc (Blanka Promontoro); la tria maroka.

Por transiri la markolon de Gibraltaro, diversaj proponoj estas eldiritaj: la plej simpla, kaj kiu nuntempe kolektas la plimulton da aproboj, antaŭvidas simple la instalon (1) tra la markolo je sistemo de *ferry-boat* (pramo) analogia kun tiu, kiu funkciadas sur diversaj punktoj de l' terĝlobo, kaj aparte inter Reggio kaj Messine.

Eĉ ne pensante, ke Hispanujo, kiam Ceuta interkomunikigos kun Oran per flanka fervojo laŭiranta la mediteranean vojon, povos sukcesi deturni pro sia profito la transiton (2) de l' vojaĝantoj al Alĝerio — kio estas hipotezo almenaŭ riskita en la nuna tempo — estas certe, ke la ĉefa vojo Ceuta-Dakar estos treege profita al la hispana komerco, kiun ĝi dotos per grand-

valora rimedo por interkomunikigi per relo kun la Okcidenta bordo de Afriko.

La negoco ne mankos al la projektita fervojo, ĉar ĝi estos la plej mallonga vojo por iri de Eŭropo en Sudan Amerikon. Nune, de Lisbonne al Pernambuco, oni bezonas dek du-dek kvin tagojn; dudek-dudek kvar estas necesaj por iri Anglujon kaj dudek kvin-dudek ses por atingi Hambour'on.

Kaj, laŭ la kalkuloj facile kontroleblaj de S^{ro} de Camarasa, la interspaco de Pernambuco ĝis Dakar, kiu konsistas el 1711 maraj mejloj, povus esti trairsta en kvar tagoj de l' modernaj *steamers* (vaporŝipoj) je rapida irado kaj tiu kiu apartigas Dakar de Ceuta (3000 kilometroj) estus trairsta en du tagoj, tiamaniere ke en malpli ol ses tagoj oni irus de Brazilujo en Madrid'on, en sep tagoj de Brazilujo en Parizon, en ok tagoj de Brazilujo en Hambour'on, en naŭ kaj duono tagoj de Brazilujo en Moskvon! Tiuj ĉi ciferoj, kiuj estas ĝustaj, ne bezonas komentariojn; ekrigardo al geografia karto montras ilian allogan elokventecon; kaj la aprobantoj de la fervojo Ceuta-Dakar plimultiĝas ĉiutage.


El « Le Petit Méridional ».

Esperantigita de J. FIZE.

(1) France, angle, germane: installation; hispane: instalacion. — (2) France kaj angle: transit; latine: transitus.



TRA LA MODO



La Modo de Rokksano.



El « Le Journal des Modistes »

(JURNALO DE LA ĈAPELISTINOJ)

16, Rue Vivienne, Paris.

Kio ricevos grandan sukceson kaj estos treege luksa, tio estos la longaj vualoj, en kiuj ni nin envolvas laŭ la orienta modo. Tiuj ĉi vualoj atingas longecon ĝis nun neviditan: ili estas longaj iafaje 8 metrojn kaj estas la tuta ornamajo de l' ĉapeloj. Ili neegale preteriras la genuon kaj falas sur la robon kiel edziniĝa vualo. Kompreneble tre hela estas ilia nuanco: dubleblugriza aŭ maizkolora.

Malpli luksa sed tre moda la mallonga vualo nomata vualotokaĝo (longa je 1 m. 50 kaj larĝa almenaŭ je 80 centimetroj) enkadrigita ĉu per gazaj aŭ veluraj rubandetoj, ĉu per velurpasamenta franĝo, ĉu per faldetoj.

Dum la plena somero, ĉe la elegantaj marbordaj triumfos la tre granda kapuĉo kun multampleksaj ornamajoj, kiuj laŭlarĝe metitaj forte montros la propran karakteron de l' ĉapeloj nomataj « je la Tartaro » portitaj en 1787 antaŭ la Revolucio.

Sendube opiniante la nekoketan sekson admirinda sub ĝiaj ĉapeloj el panamo, la koketulinaj entuziasme alprenas tiujn ĉapelojn ĉe la kamparo. Oni faras ilin elegantaj per plumo gracie metita, aŭ skarpo volvita, aŭ tufo el vapora silkaĵo.

Mi ne devas forgesi diri, ke la verdaj rozoj kaj la bluaj estas unu el la sukcesoj de l' sezono.

Nia 2^a modelo, tre moda, el maldika pajlo tabakkolora, havas sian supran parton kovritan per veluro fiksita antaŭe per larĝa buko. Ĝi estas plibeligita per du belaj plumoj tabakkoloraj hele kaj malhelle nuancitaj.

La 1^a, tre eleganta, el silka pajlo lumverda, estas ĉirkaŭita per rubando, kies banto tenas girlandon da lekantoj falantan malantaŭen. Tulo ornamas la suban parton.

Antaŭ ol fini mian kronikon, ĉu vi volas, ĉarmaj samideaninoj, ke mi diru kiamaniere sin vestis la virinoj antaŭ kvar mil jaroj?

Nu! Laŭ la famkonata italo Angelo Mosso, la Modo malmulte ŝanĝiĝis. Kun granda miro, li konstatas ke la ĉapeloj surmetitaj de la Micananinoj, ĉe la plej antikvaj tempoj, havas frapantan analogion kun la nunaj.

Koncerne la robojn, la tiutempaj belulinoj tre ŝatis la paltetojn kun mallongaj kaj larĝaj manikoj, kaj la kostumojn ornamitajn per falbaloj tre similajn al niaj tualetoj laŭ la Imperia modo. Kaj ni opinias nin progresintaj! Kia elrevoĝo!!!

ROKKSANO.

Mallonga Korespondado.

Amema kreolino. — Laŭ la terminoj de via tute ĉarma letero mi konscias kiom malpacience vi atendas mian respondon. « L'Anti Sébor » (maison Lelu, 229, rue St. Honoré, Paris) mirinde efikas sur la nigrajn punktojn de l' vizaĝo.

Olnjo en Kiev. — Jes, ho ve! oni trouzas la falsajn harojn. Turni vin al la fama firmo Marius Heng, 33, rue Bergère, Paris, kiu senpage sendos al vi sian katalogon da freŝe elpensitaj kapornamajoj.


Fidela legantino de Tra la Mondo. — Vi ne volas subpremi vian kapon per falsaj haroj, — Brave! Brave!! — kaj vi malĝoje konstatas ke la varma premilo difektas vian hararon. Ne ĉagreniĝu. Vi ne ĝin bezonas por ke viaj haroj formu ondulaciojn (2). Antaŭ ol kuŝiĝi, malseketiginte viajn ĉirkaŭkapajn harojn per biero, streĉe plektu ilin tiamaniere ke tiuj plektajetoj estu malmolaj. La morgaŭan matenon vi devas nur malplekti kaj kombi viajn harojn, kaj kun la terteco, kiu karakterizas ĉiun veran virinon, vi nepre povus laŭmode ornamati vian kapon.

Rokksano, 1, rue Andoque, Béziers, Francujo, respondas private la leterojn enhavantajn 50 centimojn kaj per la revuo tiujn enhavantajn 25 centimojn.



El « Le Journal des Modistes ».

(1) Suba parto de l' ĉapeloj kiu sublevas ilin. (2) France: ondulation. — Angle: undulation. — Hispane: ondulación.



BLINDAJ ESPERANTISTOJ EL « PERKINS INSTITUTION ».
 S^{ro} Edw. K. Harvey.



INSTRUISTOJ KAJ KURSOJ.
 de la « Lernejo de la Lingvo Esperanto ».

ESPERANTO ĈE LA JUNULARO — 3^a SERIO.

Hodiaŭ ni prezentas fotografiaĵojn de amerikanaj kaj japanaj studentoj, ĉar ni opinias tiun proksimigon instrua.

Jen, pri la unuaj, interesa letero de nia fervora samideano Edward K. Harvey, profesoro en *Perkins Institution*,

« Mi plezure sendas al vi fotografon de la esperanta blind-klubo en la Perkins Institution, Boston, U. S. A. Tiu ĉi grupo ne sole estas la dua klubo en la Unuigitaj Ŝtatoj (ĝi estas fondita la 24^{an} de Marto 1905) sed ankaŭ, mi kredas, la sola blind-klubo en Nord-Ameriko. Ĝi konsistas el studentoj, kiuj ŝatas la lingvon Esperanto kaj uzadas ĝin per korespondo kaj interparolado.

Pli ol ses nun interŝanĝas leterojn kun fremdaj blinduloj. Unu, kiu bedaŭrinde ne troviĝas en la fotografiaĵo, ĉar li ĵus foriris en kolezion, korespondadas per skribaĵoj kun personoj en Rusujo, Germanujo, Svedujo, Hispanujo, kaj Ĉililando.

La klubanoj multe bedaŭras ke oni uzas malsaman metodon, skribante per Brajaj punktoj, ol tiu uzata en Eŭropo. Tial ili devas lerni du sistemojn kaj la malfacilaĵoj de lingva lernado multe pliiĝas. Por eniri la « Esperantistajn Pionirojn » oni devas plenumi ekzamenon pri la gramatiko de sia nacia lingvo.

La klubo celas fondiĝi aliajn similajn klubojn en diversaj blindlernejoj kaj jam presigis multe da esperantaj libroj per la amerikanaj levigitaj punktoj. La sekretario estas William Graham, adreso, Perkins Institution, Boston, U. S. A. »

La letero estis skribata la 17^{an} de Nov. 1906 kaj, kompreneble, de tiu dato, la klubo faris novajn progresojn.

La 25^{an} de Marto 1907, la anoj festis la duan datrevenon de l' klubo fondo. Pri tio skribis afable al ni S^{ro} K. Harvey:

« Tre interesan kaj sukcesan koncerton ili donis al la publiko antaŭ unu semajno kaj la programon mi enmetas. La ĵurnaloj tre favore kritikis la aferon. Pli ol 180 esperantistoj ĉeestis kaj post la afero Profesoro Huntington, el Harvard Universitato, paroladis pri la Geneva Kongreso. Li afable donis al tri junaj blinduloj la diplomojn, kiujn ili gajnis per malfacilaj ekzamenoj plenumitaj. La klubo intencas sendi al la Tria

Kongreso du el siaj anoj kaj por pagi ilian elspezon donis tiun koncerton. Ĝi estis sukcesplena. »

EDWARD K. HARVEY.

Ni esperas ke tiuj sciigoj estos nova kuraĝigo por tiuj, kiuj interesas sin al la malfeliĉaj blinduloj, kaj ke ili deziros ankaŭ partopreni en nia monokolekto.

Pri la japanaj samideanoj prezentataj, ili estas tre klarvidantaj korpe kiel sprite; la partopreno de ili kaj de iliaj sampatrujanoj en la movado esperantista montras, ke nenia moderna temo estas fremda al la agema Japanujo.

Nia dua serio havis bonegan rezultaton: tuj post la ricevo de ĝi, S^{ro} Fredrik Skog, ano de la grupo en Falun, skribis al la klubo esperantista de « Roxbury Latin School »

KARAJ SAMIDEANOJ!

« Hodiaŭ ricevinte la feb. numeron de *Tra la Mondo*, enhavantan portreton de nia klubo — kies vicprezidanto mi estas — kaj de la via, mi proponas korespondadon inter mi kaj unu ano de via klubo!... »

Tiu poŝtkarto — pro la malproksimeco — alvenis ĉe « Roxbury Latin School » samtempe kiam la aludita numero, kiu — tiel — tuj interrilatigis la du klubojn. Pri tio sciigis nin « The Tripod », la bonega organo de « Roxbury Latin School ». En ĝi ni legis ke S^{ro} Lowell, la sindona profesoro, gajnis al Esperanto novan gazeton, « *Skrif Book* ». Bonege.

Plezure ni daŭros helpi la disvastiĝon de Esperanto ĉe la gejunuloj, kaj estos feliĉaj faciligi la rilatojn inter ili.

En la liceo Lamartine, Mâcon (Saône & Loire) France, ekzistas grupo esperantista « L'Espero », kies prez. estas S^{ro} G. Braziers, profesoro.

Legajo por gejunuloj: Elektitaj fabeloj de fratoj Grimm.

Jakob' kaj Vilhelm' Grimm, naskitaj en 1785^a kaj 1786^a jaroj en Hanau apud Majno, studis ambaŭ ĉe la Marburga universitato, kie ilia intereso baldaŭ celis la esplorado de germana lingvo kaj la trezorojn de ĝia literaturo. Poste ili multfoje kunlaboradis kaj la « Haus-und Kindermärchen » (fabeloj por domo kaj infanoj) estis ilia unua komuna verko, kiu akiris ĉiean aplaŭdon.

Post 6 jara senlaca kolektado en sia hejmlando ili eldonis en 1812^a jaro la unuan volumon de la fabeloj, kiun sekvis poste du pliaj. Tiele ili elŝiris ĉirkaŭ 150 fabelojn el la mallumo, kie ili antaŭe restis per nur buŝa tradicio. Ĉiuj la gekaruloj, Cindrulino, Neĝulino, Knabo-Fingro, Joĉjo kaj Margenjo elrampis de la hejmecaj benkoj post la fornoj kaj el la ŝpinĉambroj (kie vespere la vilaĝa gejunularo kunvenadis por interbabilado dum la knabinoj ŝpinis) kaj nun ili akiris certan lokon en la koro de la tuta nacio. Ili fariĝis la unua poezia bloveto, kiu ĉirkaŭadas la infanajn animojn. Aliaj verkistoj pritraktis

legendojn kiel fabelojn; la diferencon inter ambaŭ specoj difinis unufoje fratoj Grimm: La legendo estas fiksita al preciza loko kaj estas iom historia, la fabelo kontraŭe estas pli poezia, ĉie estas ĝia sorĉmondo, en kaŝigaj arbaroj, subteraj kavernoj kaj en maro profunda.

Esence la fabelo ne enhavas moralan celon, tamen moralaj motivoj enestas en multaj germanaj fabeloj. La virtoj de amo kaj modesteco estas indigitaj; maliceco, malvero, fiereco kaj senlima postulado estas punataj.

Multaj el la fabelherooj estas priskribitaj kiel amemaj kontraŭ homoj kaj bestoj; ofte ni vidas, ke la ruzulo subenigas la krudan fortulon, en « Kamerado Gaja » la heroo de l' fabelo eĉ trompas senĝene la sanktan Petron kaj timigas la diablon, tiel ke li ne rajtas eniri inferon kaj fine li ruze enigis sin en ĉielon.

Ĉiuj germanaj fabeloj enhavas ion gajecon, prefere ili finiĝas kun perspektivo al longa daŭra feliĉo.

Laj verkistoj instigitaj per la sukceso de la Grimm-aj fabeloj eldonis similajn kolektojn, parte de memtrovitaj fabeloj, sed ili nur pligrandigis la ŝatigon de la Grimm-aj, ĉar ili ne estis elektintaj kiel ĉefprincipon la precizecon kaj verecon de l' alprenado, la kopiadon de tio kio vivas en la popolanaro sen ornamenta arbitreco, kiel ja faris la fratoj Grimm.

La esprimon, certe ilia propra verko, ĉiam estas ĉe ili tiel simpla kiel ĉe la plej simpla popolano.

Nun la konata tradukinto, nia samideano, D^{ro} Kabe, prezentis al ni kolekton el tiuj ĉi fabeloj en nian karan lingvon, kaj kion oni povas laŭdi pri la originalaj tekstoj, tion oni povas ankaŭ diri pri la tradukitaj. La simpla hejmeco de la originaloj estas bonega trafita, tial la libreto, kiun esperinde baldaŭ sekvos dua el la sama originalkolekto, fariĝos ŝatata legaĵo ne nur por junaj esperantistoj, sed ankaŭ por ĉiuj eklernantoj de nia lingvo kaj por ĉiuj, kiuj konservis senton por gaja babilado kaj hejmeca poezio.

La elekto de la fabeloj estas saĝe farita, ni trovas apud la ĉi-konataj ankaŭ tiujn, kiuj, kvankam same interesaj, tamen eĉ por kelka Germano estas nekonataj. Ni deziras al la libreto sukcesplenan migradon, kaj ke ĝi ĝojigu multajn junajn kaj junecajn animojn en ĉiuj partoj de l' mondo.

P. CHRISTALLER

Parolado de S^{ro} de Beaufront.

La 11^{ma} de Majo, S^{ro} de Beaufront, l' agema prezidanto de la S. f. p. E. vizitis Orléans dum parolada vojaĝo. Li estis kore akceptata de la ĉi tiea grupanaro. Post amika vespermanĝo, la eminenta propagandisto faris intiman paroladon, dum kiu li klarigis speciale la progresojn de la ideo pri internacia lingvo en la mondo. Li rakontas la komencojn tiel malfacilajn; diras kiel la malprospero de Volapük estis terura barilo por la akcepto de ideo pri lingvo internacia; kiel — aliparte — la 5-lingva broŝuro de Doktoro Zamenhof estis tute netaŭga kiel propagandilo; kiel, do, la unuaj progresoj estis eblaj nur post la edono de la *unua manlibro* por Francioj; kiel ili iĝis pli rapidaj post la fondo de la S. f. p. E. kaj de l' «**Esperantiste**»; kiel li gajnis la scienculojn dum iaj kongresoj de la Internacia Ekspozicio en Parizo dum la jaro 1900; kiel, de 3-4 jaroj, la progresoj estas mirindaj en multaj landoj eŭropaj, aziaj kaj amerikaj, speciale Anglujo, Germanujo, U. S. de A.; kiel tiuj rezultatoj estas grandparte ŝuldataj al «**l'Espérantiste**» kaj al li. «**Ne estas necesaj multe da personoj, diras la paroladanto, por esperantemigi ian landon. Oni donu al mi nur 2 fervorajn homojn, eĉ nur unu, tio sufiĉas al mi.**» Ni esperu ke S^{ro} de Beaufront trovos baldaŭ tiajn homojn en Afriko kaj Oceanio, por ke li povu aldoni tiujn kontinentojn al sia esperantista mondkarto.

Plena je sia temo, kaj kvankam li diris modeste, ke li ne estas oratoro, li ĝin elĉerpas flue kaj agrable. Li donas poste kelkajn argumentojn uzeblajn okaze kaj traktas sufiĉe longe la temon «**Esperanto kaj la franca lingvo**», respondante — ne nomante lin — al la eminenta akademiano grafo d'Haussonville.

Estas iom bedaŭrinde, precipe nune, ke, nominte neniam kiam li parolis pri la akademianoj nefavoraj al Esperanto, la parolanto ebligis kredi ke ĉiuj akademianoj estas kontraŭ Esperanto.

Se iu estas malfavora, aliaj kiel André Theuriet, François Coppée, Jules Claretie, Henri Lavedan, k. t. p. permesis ke oni traduku iajn verkojn de ili en Esperanto, kiel scias la legantoj de «**l'Espérantiste**» pri la du lastaj. Tio estus lerta sciigi ke, inter la sciencaj akademianoj, homoj tiaj kiaj generalo Sébert, la bedaŭrata doktoro Javal estas aŭ estis *agemaj* esperantistoj, ke la mondfama ĵus mortinta Berthelot estis tute esperantema.

Tiuj nomoj, facile memoreblaj, aldonataj al tiuj de S^{ro} de Beaufront kaj de S^{ro} René Lemaire havigus pli da pezo al la paroladoj, kiujn certe faros la esperantistoj de Orléans, revarmigitaj de la flama parolo aŭdita.

Tiun bonegan vesperon finigis la himno «**Espero**» laŭ la muziko de de Ménil, poetaj versoj de S^{ro} Verdier, dediĉitaj al la «**dua patro**» de Esperanto, kaj horo «**Antaŭen Esperantistoj**» de la sindona sekretario de l' grupo, S^{ro} Chaussard. F^{ino} Renard diris talente «**Sub la faldoj de nia standardo**».

«**Le Republicain d'Orléans**», «**Le Patriote Orléanais**», «**Le Progrès du Loiret**» kaj «**Le Journal du Loiret**», kiuj sendis reprezentantojn, faris bonegajn raportojn pri la tuta festo.

A. MONTROSIER.

Legante la novan anoncon de l' interesa «**Internacia Sciencna Revuo**», oni eble miros vidante la manieron laŭ kiu estas montrata la prezo. Ĝi rilatas *projekton pri internacia monsisistemo* prezentitan de S^{ro} R. de Saussure en la n^o 41^a de la revuo, tre kuriozan kaj allongan, kiun tre forte ni rekomendas al la atento. La tuta n^o, cetere, estas des pli interesa.

LA ESPERANTISTA « VAGABONDA » KLUBO.

Eble kelke da niaj legantoj scias, ke ekzistas en Londono klubo nomita la «**Vagabond**», konsistanta el bonkonataj membroj de la literaturaj, muzikaj, artaj aŭ sciencaj profesioj. Tiu klubo estas fermita, t. e. ke oni eniras en ĝin nur laŭ speciala invito, kaj tiuj invitoj estas konsiderataj kiel granda honoro de la invititoj.

Nia samideano F^{ino} C. W. Oxenford opiniis ke simila klubo estus ŝatinda ligilo inter la artemaj esperantistoj kaj fondis la «**Vagabond'on**» esperantistan.

La ideo ŝajnis al ni bonega ĉar, pli ol iu ajn, ni scias kiom multaj estas la esperantistoj artemaj ĉiufake. Cetere, niaj legantoj ĝin scias ankaŭ.

Ni do akceptis plezure honorindan lokon en la komitato formiganta kaj donas ĉi sube kelkajn sciigojn pri la klubo, kaj la resuman regularon.

La Esperantista Vagabonda Klubo.

Prezidantino : F^{ino} OXENFORD.

Sekretariino : F^{ino} PADWICK.

Konsilantaro : (en formado).

F^{ino} C. BURLEIGH, Mus. Bac., Anglujo.

Sir. J. THORNTON, K. C. B. »

S^{ro} L. E. MEIER, Bavarujo.

D^{ro} G. BUSUTTI, Malta.

S^{ro} A. MONTROSIER (Red. «**Tra la Mondo**») Francujo.

S^{ro} P. AHLBERG (Red. «**Esperantisten**») Svedujo.

Inter niaj amikoj estas :

D^{ro} L. ZAMENHOF, Aŭtoro de la Esperanta Lingvo.

Prof. CARLO BOURLET, D. S., Prof. à l'École des Beaux-Arts et au Lycée St Louis, Paris.

Prof. CART, Prof. au Lycée Henri IV et à l'École des Sciences Politiques, Paris.

Rektoro E. BOIRAC, Rektoro de la Dijon'a Universitato.

S^{ro} WALTER CRANE, la eminenta angla artisto.

S^{ro} W. H. BOND, Estro en Urb-Arternejo, Brighton.

Ĝeneralaj Celoj :

Formi grandan internacian societon aŭ frataron de aŭtoroj, muzikistoj kaj artpentristoj, per Esperanto. Propagandi Esperanto'n inter tiu publiko, kiu bezonas esti amuzita antaŭ ol ĝi serioze konsideros novan movadon.

Membreco :

Oni povas iĝi ano nur per persona invito aŭ per elekto.

Estas tri sekcioj, nome :

1. **Membroj.** Tiuj personoj kiuj estas efektivaj aŭ intencontaj Esperantistoj, kaj kies profesio estas aŭ literatura, aŭ muzika, aŭ arta.

(La termino «**literaturo**» enhavas la pli altvicojn de ĵurnalismo, kaj «**arto**» enhavas ĉiuspecon de Teatrarto).

2. **Hon. Membroj.** (a) Tiuj Esperantistoj, kiuj estas neprofesiaj muzikistoj, literaturistoj aŭ artistoj, sed kies verko estas sufiĉe bona por publika eldonado aŭ elmontrito. (b) Profesuloj kiuj tre interesiĝas pri nia afero kaj deziras helpi ĝin, sed kiuj ne scias la lingvon pro manko da tempo por lerni ĝin.

3. **Amikoj.** Tiuj profesiistoj (ĉu literatura, muzika, arta aŭ scienca) kies famo aŭ sociala situacio estas morala subteno egale por Esperantismo kaj la Klubo. Tiaj ne estas petitaj pagi kotizaĵon.

Kotizaĵo :

La ĉiujara kotizaĵo estas 3 fr. por membroj kaj hon. mem., kaj estas datumita de unu el la kvaronoj, nome : 1^a de Jan., 1^a de Aprilo, 1^a de Julio, aŭ 1^a de Oktobro.

Devoj (nur por membroj; hon. mem. povas fari tion, kio plaĉas al ili) :

La pentrantistaj membroj devos aranĝi artan sektion ĉe la ĉiujara Kongresa Ekspozicio, por kiu ĉiu devos sendi almenaŭ unu artaĵon, kvankam ne necesse pentraĵon.

La muzikaj kaj aktoraj membroj devos organizi koncerton por sekvi la ĉiujaran vespermanĝon, kiu okazos dum la ĉiujara Kongreso.

La literaraj kaj muzikaj membroj devos verki aŭ komponicii per Esperanto, almenaŭ unu verkon en ĉiu jaro, dum ili estos membroj de la Klubo.

Tuj kiam eble, aperos monata organo, aparte pagebla.

A. M.

FELIETONO

La Specialistoj.

Tradukita el la Holanda lingvo.

Louis Soft estis fortika, larĝkapa kaj grasventra viro. Liaj okuloj ne similis tiujn de generalo, ili rigardis dormeme sub liaj brovoj kaj elestis ekster la okulkavoj. Lia barbo estis densa kaj ruĝa, liaj lipharoj estis vaksumitaj kaj zorge brositaj; liaj haroj apud liaj plenevinaj tempioj bukligis iom, kaj sur lia glata kranio nur estis kroneto, kiun lerta haristo ĉiumatene kombis tiamaniere, ke neintimulo ne tuj ekvidis kiel malmulte da provizo estas tie.

Louis Soft estis ordinara rilate farajojn kaj korpon, li posedis ion malmajestan kaj tro multe da memŝatado, sed li estis estinta butiketisto kaj li progresis per sia laborpotenco, sia prospero kaj sia ripenso (aliaj diras: sia talento) de la rango de ordinara butiketisto ĝis tiu de majstro de la amerika fromaĝmovado.

Li estis ĝenerala direktoro de la « Worlds Combined Cheese Trust » (1) kaj akceptis la titolon « generalo » por mallongigo kaj komforteco, ĉar tiu ĉi titolo ne havis ion malŝatindan kaj estis konforma al lia granda korpo. Tio ĉi ne estas stranga en Ameriko, kie, komferte, titolo estas donata en restoracioj al viroj, kiuj tenas ĝin tra sia tuta vivado kaj kiuj senŝanceliĝe enskribas ĝin en la hotelan fremdullibron.

La nombron da « majors » (2) en Ameriko mi taksas almenaŭ unu milionon; la generaloj tamen estas pli maloftaj, ĉar povas esti nur po unu generala direktoro por unu komerca komitato.

Louis Soft estis transloĝiginta de loĝejo en loĝejon, de butiketo en la « mansion » (3) kaj lia sociala progreso ne fleksigis lin harlarĝe ĝis mokindeco.

Li estis unu el la feliĉaj personoj, kiuj estas kontentaj je ĉio, sed kiam iamatenne, maldiligenta en sia balancanta seĝego, siajn piedojn en brile ciritaj ŝuoj, li sidis maĉante pecon da premata tabako kaj meditis sian tutan feliĉan vivadon, li sentis ion ĉagrenigan, nome ke estas domaĝe, kiam homo mortas kaj disiĝas de tio, kion li amas plej multe... la honoron.

Li multe timis la morton, kaj iajoje (ne estis imago) li sentis en sia ventro, kiu cetere estis plenigita pli ol normale, pikantan doloron, ie, kie la.... apendicito eble estis.

Tiujn punktetojn antaŭ la vorto apendicito mi skribas plenkonscience, ĉar ili klarigas kiel time Louis Soft ĉiam elparolis tiun ĉi timatan vorton. Sed tiumatene li estis eksciinta ke fama borsisto estis mortinta post apendicit-operacio, kaj anonco por « ĉiamkuracanta » medikamento de D^{ro} Kidder kaj Cutter, kun ĝusta difino pri multe da

malsaneroj, konvinkis lin, ke ankaŭ li mortus baldaŭ per apendic-absceso.

Kaj nun ĝuste tiu abomena intesto estus tiu sola superflua peco en la naturo, kiu kondukus lin en la tombon! Li ŝvitis pri tio.

Kaj tio ne estis fantazio, ne estis peno, kiun li estis farinta al si (ĉar li ne havis penojn), ĉar klare li rememoris ke, iamatenne, antaŭ dekonu jaroj, dum tre varma tago, li estis manĝinta oranĝon ĉe la pordo, ordinaran frukton, aĉetitan al okaze preterpasanta itala stratkolportisto, de kiu frukto li englutis, rapidante, du kernojn. La tuta okazintaĵo venis subite en lian memoron.

Li elprenis sian naztukon, viŝis sian frunton kaj poste li sonorigis al la nigra servanto por alportigi glason da akvo.

Bagatelo en nia vivo estas kelkafoje decidanta. Tiun tagon la servanto, nur por diri ion, diris: La generalo ŝajnas iom pala hodiaŭ, kaj la « trust »-reĝo jam sentis sin mortanta.

Li leviĝis malrapide, rigardis en grandan venezian spegulon kaj respondis: Mi estas malsaneta. Telefonu kuraciston Bull, por ke li venu tuj; aŭ ne... jungu la veturilon kaj mi mem iros tien.

Li veturis al la fama Bull-hospitalo, kie ĉiutage multaj suferantoj estas operaciaj, kaj anoncigis sin ĉe la fama kuracisto.

Tiu ĉi rigardis la vizitkarton kaj atendigis kelkajn suferantojn je malpli grava financa potenco kaj akceptis lin.

Sinjoro Soft eniris la ĉambron ŝanceliĝante, ĉar la hospitala odoro havis neresanigeblan efikon, kaj li diris balbutante: Doktoro.....

Li ne diris plue, sed li lasis sin fali laca sur malgrandan seĝon apud la verda tablo.

La kuracisto gratis sian kranion, rigardis lin zorge, ĉar unu vorto ofte pli signifas ol multaj kaj demandis: Ĉu ĝi estas grava, sinjoro Soft?

— « Treege »! lia voĉo estis malforta kaj raŭka.

— Kie?

— Tie ĉi.

La gesto iris al la ventro kaj la kuracisto ekkompenis.

— La apendicito?

Jesigo.

— Kiel vi scias? Ĉu vi vizitis jam aliu?

Tiam la rakonto venis senliga sed malĝoja:

(Daŭranta).

J. H. SALOMON.
(Holandano).

(1) Kombinita fromaĝkomerca komitato de la mondo. — (2) Majoroj. — (3) Grandega pensio.

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.

EN BEAUNE.

La 14^a de Aprilo granda festo ĉe la grupo de Beaune, je l'honoro de l' dudekjara Jubileo: Sukcesego! Teatro plenege... entuziasmigita publiko. — Grupoj Burgundaj reprezentitaj. — Standardoj Stelhavaj. — 60 personoj kantantaj « L'Espero ». — La poŝhorloĝo, « L'Espero » najlo (franca esprimo signifanta la ĉefaĵo) de la loterio. — Aligoj pluvantaj al la grupo. — Favoregaj raportoj en la gazetaro, speciale en « Le Journal de Beaune » et « L'Avenir Bourguignon ».

Nia amiko Bord estis scenordiganto, kantanto, paroladanto, aktoro! En la programo oni intermiksas lerte kaj saĝe la francan lingvon kaj Esperanton. Por plifaciligi al la necesperantistoj la komprenon de tiu lasta, la tekstoj recitotaj estis enpresitaj kun la franca traduko en bongan « Jara bulteno de l' grupo esperantista en Beaune », kiu donas interesajn sciigojn pri la agado de l' grupo dum la pasinta jaro. (De 38, ĝi kreskis ĝis 170 anoj). Ĉitinda, je la fino, alvoko al la grupanoj por ke ili, pli vole, elektu — kiel liverantojn — la komercistajn anojn de l' grupo, kies adresoj kaj specialaĵoj sekvas la alvoko.

Tre lerte verkita, ankaŭ, estas la perioda bulteno de l' grupo en Le Creusot, kun praktikaj sciigoj.

La eldono de tiaj periodaj bultenoj estas bonega kaj rekomendinda loka propagando ĉar, nature, loĝantoj de ia ajn regiono interesas sin pli facile al tio, kio interesas la diritan regionon. La « Bulteno de l' grupo de Beaune » estas sendata laŭ peto akompanata de 15 cent. poŝtmarke, ĉe S-ro Bord, 20, Faubourg Bretonnière, Beaune, France.

Por la blinduloj. Kvara Nomaro.

Grupo esperantista de Orléans	16 fr.
S-ro Chatot (Toulouse)	2 fr.
Sume	18 fr.
Jam ricevitaj.	91 fr.
Kune	109 fr.

Abonoj al « Tra la Mondo ». Reklamo.

La jenaj favoraj kondiĉoj koncernas **NUR KAJ NEPRE** la abonojn senditajn **SEMPERE** al nia administracio en Meudon.

1^o Kiu havigas 6 **novajn** abonojn, ricevas sepnan **senpage dum unu jaro**, aŭ 2 duonajn abonojn, aŭ 4 kvaronajn abonojn.

2^o 3 personoj mendantaj **kune novan** abonon pagas nur 7 fr. anstataŭ 8 fr. Do la mendinto bezonas sendi nur 21 fr. anstataŭ 24 fr.

3^o **Malnova** aboninto kiu, renovigante sian abonon mendas 2 **novajn** abonojn samtempe pagas nur 7 fr. Do, kiel en la 2^a kazo, li bezonas sendi nur 21 fr. anstataŭ 24.

4^o Kiu havigas al ni **anoncojn** ricevas 25 % el ilia valoro kiel malklerajon.

Enketo pri enketo. Konkurso.

Ni rememorigas ke la prepara enketo konsistas respondi la jenajn demandojn :

1^o Kiun temon vi proponas por la definitiva enketo.

2^o Proponu detalan demandaron.

3^o Kiom da personoj, laŭ vi, proponos la saman temon.

La 3^a demando ebligos elekti la respondojn, por la aljuĝo de l' premioj, se du aŭ pli ol du havus la saman valoron.

Jen la nomaro de la premioj dediĉitaj al tiu konkurseto :

1^a premio : 4 serioj da 3 sinsekvaj numeroj de 4 malsamaj propagandaj gazetoj kaj 2 kvaronjaraj abonoj al « Tra la Mondo ».

2^a premio : 1 ekz. de « Tra Mez-Afriko » kaj 1 kvaronjara de « Tra la Mondo ».

3^a premio : 2 gazetaj serioj.

Oni povos elekti inter la jenaj gazetoj : *L'Esperantiste*, *La Belga Sonorilo*, *Germana Esperantisto*, *Pola Esperantisto*, *Esperanto-Journal*, *Ĉasopis Českych Esperantistu*, *Suno Hispana*.

FERVOJOJ DE PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE.

La Kio **P. L. M.** ĵus eldonis, kiel faldeblaĵon, la kartojn pri la regionoj **Savoie** kaj **Dauphiné**. Tiuj faldeblaĵoj-kartoj titolitaj « *Dauphiné-Savoie* » kaj « *Savoie-Dauphiné* » konigas pri la reliefoj de l' montaroj kaj surhavas, dorse, sciigojn pri la diversaj vojaĝaj kombinoj uzablaj de la publiko ; ĉiu faldeblaĵo-karto estas aĉetebla, 1 fr., ĉe la bibliotekoj de l' ĉefaj stacidomoj de l' rereto, aŭ ricevebla hejme laŭ peto akompanata de 1 f10 poŝtmarke : al Service Central de l'Exploitation, Boulevard Diderot, 20, Paris.

★ ESPERANTO ★

Duonmonata internacia Gazeto.

La plej ofta ! La plej malkara ! La plej disvastigata !

Tutmonda Informilo — **Korespondantoj en ĉiuj landoj.** — Informoj pri politiko, komerco & industrio, financo, statistiko, legoscienco, instruado, teatro, k. t. p.

Felietono — **Kroniko politika** — **Internaciaj Enketoj** — **Konkursoj por la legantoj kun valoraj premioj.**

Esperanto, en speciala parto, publikigas ĉiujn sciigojn pri la praktika uzado de Esperanto ; ĝi estas la organo de la konsuloj, Esp. Oficoj, kaj specialaj peresperantaj societoj.

Esperanto aperas en ĵurnala formato. Ĝi estas aĉetebla ĉe la belgaj, francaj, svisaj, svedaj, stacidomoj, kaj ĉe multaj publikaj ĵurnalvendejoj en ĉiuj landoj.

Unu numero : 10 centimoj. Jarabono : 3 frankoj.
Direkcio : 8 rue Bovy-Lysberg, Genève [Svisujo].

ESPERANTISTOJ

FASIGU LA SOMERON

EN

Aix=les=Bains


(FRANCLANDO)

Sendu 30 centimojn al la **LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO** kaj vi ricevos aŭfranke la interesan broŝuron de D^r J. DARDEL, pri la termala kuracado en tiu urbo.

ASP

KANDELLANTERNOJ

por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza, Oportuna, Pura, Neestingbla en Ventego.

Funkciadas bonege nur kiam oni uzas la por ĝi

Konstruitajn ASP-Kandelonojn

120.000 Lanternoj jam venditaj !

Kostas : 4 danajn kronojn,

kun lenso 5 kronojn,

18 Kandelonoj kostas 1 1/2 kronojn.

SENDOTA ĈIEN DE


O. F. ASP, Kopenhague.
DANUJO.

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

General Agento :

Sro G. RUTTER, 30, Red Lion Squar, LONDON.



Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn **NE** esperantajn.

NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.

NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.

NI sendas niajn katalogojn **senpage**.

Librairie de l' Esperanto
(Internacia esperantista libredo)
46, rue Sainte Anne
Paris.

Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la
Internacia Scienca Oficejo Esperantista
Genevo-Svislando.

Kelkaj el la lastaj originalaj artikoloj:

- Universala kalendaro*, de CARLO BOURLET, Parizo (Franc.).
Deveno de l' speco ĉe la lepidopteroj, de P. A. H. MUSCHAMP (Angl.).
Projekto pri internacia atlaso de « erozio », de E. CHAIX, Genevo (Svis.).
Evolucio de la religia ideo, de DR^o L. VALLIENNE, Parizo (Franc.).
Pri la uzobleco de la fortoj de l' homo, de ANDRÉ BROCA, Parizo (Franc.).
Nuna Stato de Internacia Bibliografio, de J. HANAUER, Frankfurt a/M. (Germanujo).
Projekto pri internacia monsisistemo, de R. DE SAUSSURE, Genevo (Svis.).
Pri kelkaj Merovingaj kaj mezepokaj kranoj trovitaj en Angers (Franc.).
de G. V. DE LAPOUGE, Angers (Franc.).
Nova speco kaj nova gentonomo de formikoj, de D^o A. FOREL, Yvorne (Svisujo).
Psikologio de l' popolamasoj, de P. LAPIDARI, (Ital.).

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2,75 Sm. (2 spesmiloj 75 spesdekoj), aŭ 7 frankoj.
Unu numero: 25 spesdekoj aŭ 65 centimoj.

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Genevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Giusti*, Livorno, (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Rusujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Høst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo)

Esperanto kaj la aŭstria militistaro.

Ankaŭ en Aŭstrio la unua grava paŝo jam estas farita por enkonduki la internacian helpan lingvon unue almenaŭ ĉe la oficiraro de i. k. r. armeo. Kapitano en fortikaĵartileria regimento, nome Alfredo Engel, dum Marto dufoje paroladis antaŭ aŭdantaroj, kiuj konsistis el preskaŭ 200 oficiroj ĉiu-gradaj, inter kiuj estis eĉ generaloj; la unuan paroladon ĉeestis ankaŭ la fortikaĵestro. La paroladoj okazis en Przemysl kaj Jaroslau (Pŝemil kaj Jaroslau), garnizonoj en Galicio, orienta parto de la aŭstria imperio. Kapitano Engel sukcesis jam akiri lernantojn de nia lingvo inter siaj kamaradoj kaj du kursoj ekzistas nun: la unua (24 oficiroj) en Przemysl, la alia en Zurawica (Juravica), kie la kapitano loĝas. En tiu ĉi lasta loko apud Przemysl troviĝas ok adeptojoficiroj.

Kiom granda estas la intereso pri la lingvo « Esperanto » precipe en Przemysl, tion pruvas la faktoj, ke en la komuna legoĉambro de l' tiea oficirkubejo « Tra la Mondo » estas trovebla, kaj ke la kursanaj oficiroj abonis tri esperantajn gazetojn.

Intereseĝa estas la letero, kiun ricevis la aŭtoro de tiu ĉi raporto pri la plej unua propagando de Esperanto en la aŭstria armeo. Jen la tradukita teksto.

« La demando de tutmonda lingvo en nia (aŭstria) armeo jam antaŭ 17 jaroj estis iniciata de S^{ro} Francisko Chyle (Hyle), tiam kapitano-kalkulisto ĉe la inf. reg. n^o 101, nuntempe militistara kalkulista konsilanto ĉe la imperia milita ministerio. En la 1890^a li paroladis en la hungara garnizona urbeto Békéscsaba (Békeŝĉaba) komparante ambaŭ sistemojn de tutmonda lingvo Volapuk kaj Esperanto. Jam tiam la militistara kalkulista konsilanto Chyle, kiu estis studinta ĉiujn problemojn de tutmonda lingvo aperintajn ĝis tiam, nomis Esperanto'n la sola ĝusta solvaĵo de la problemo de tutmonda lingvo. Per publikiĝo de lia studaĵo « *Pri neceseco kaj ebleco de lingvo tutmonda* » en la militistara revuo de Streffleur (Strefler), jarkoleto de la 1892^a, al la armeo, Esperanto estis konigata. Ke la internacia helpa lingvo en niaj (aŭstria) militistaraj rondoj ne renkontas tian intereson, kia al la Esperantistoj eble ŝajnas dezirinda, tio facile estas komprenebla, kiam oni konsideras, ke la aŭstria aŭ hungaraj oficiroj krom tio jam estas ŝarĝitaj per ellernado de la diversaj lingvoj naciaj de l' monarĥejo.

En Francujo same kiel en ĉiuj grandaj ununaciaj ŝtatoj la ideo de tutmonda lingvo pli facile povas enradikiĝi ol en nia multlingveca monarĥejo. Por kio utilis Esperanto en la aŭstria-hungara armeo? Ĉu

ĝi anstataŭus la lingvojn regimentajn? La oficiroj nenion kontraŭdirus, ĉar nuntempe, ili devas ellerni laŭvice ĉiujn lingvojn naciajn kaj, celante pli altan rangon, eĉ la lingvojn francan, anglan kaj italan. Sed kio estus pri la soldataro? Unue Esperanto devus esti enkondukata en ĉiujn popolajn (unuagradajn) lernejojn krom la diversaj nacilingvoj kiel lingvo obligacie (devige) instruata. Ĉu tio ja estas realigebla (efektivigebla) projekto? Tial ne foresto de intereso pri Esperanto sed la pripensoj, ke enkonduko de la lingvo en la armeon estas necbla, kaŭzas, ke la estraraj rondoj ne okupas sin pli intensive pri la demando de tutmonda lingvo.

Por la propagando de Esperanto kiel internacia helpa lingvo unue la scienculoj, komercistoj kaj tiuj, kiuj okupas sin je interkomunikiĝo, estas destinitaj. Sed tiuj ĉi staras nuntempe ankoraŭ skeptikeme kontraŭ Esperanto same kiel generale kontraŭ lingvo tutmonda ».

La ekzemplo donita en la supre cititaj lokoj galiciaj montras, ke oficiroj pli junaj ankaŭ en la aŭstria armeo komprenas jam kian utilon havas por ili la scio de la internacia helpa lingvo en certaj okazoj, nature ne interne de ilia armeo sed eble — la lasta artikolo en la numero de la 27^a de Marto de l' geneva « Esperanto » detale preparolis tion — en eksterlando. Almenaŭ la ellernado de Esperanto estas por la oficiroj de tiuj garnizonoj enlokigitaj meze de regiono ne tre civilizita, certe bonveninta amuzaĵo pli laŭdinda ol la ĉiama kartludado aŭ aliaj.

En la supraj lokoj oni silentadas ĝis nun; tamen ne estas dubeble, ke post mallonga tempo ankaŭ la ĉefoj de la aŭstria armeo prijuĝos pli favore la movadon poresperantan en la oficiraro. La aŭstria armeo ja estas fieraj pri tio, ke ĝi respektas kaj amas la progreson en ĉiu rilato. Ĝi do en tiu ĉi direkto ankaŭ ne longe malantaŭerestos.

JOH. SCHRÖDER, Wien (Aŭstrio).

Propagando en la franca armeo.

Komandanto Lemaire Ch. disponigis K^o Capé je 25 ekz. de « Tra Mez-Afriko ». Jam kelkaj estas senditaj al la franca ministro, kiu dankigis la sendinto de la generalo korpusa komandanto, al la generaloj komandantaj la lernejojn de « St. Cyr » kaj politeknika, al la tri kolonejoj de l' regimentoj en Orléans.

Nia amiko intencas disdonaci la aliajn al lernejoj militaj, al « Soldatj-Domoj » al grupoj kiuj havas militajn kursojn. Li deziras ke la profesoroj bonvolu sin turni al ni sendante sciigojn pri la kursoj; nomo de la kazerno, nombro de ĉeestintoj (komence kaj fine), rezultatoj akiritaj, k. t. p.

T. L. M.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato.

LA PLEJ MALNOVA EL ĈIUJ ESPERANTISTAJ
GAZETOJ FONDITA EN 1895.

ADMINISTRACIO:

Preso Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris.

JARA ABONO:

Sen Literatura Aldono 5 fr. »
Kun Aldono 7 fr. 50

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj

Jara abono: 2 fr. 50.

Administracio: Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Ĉe la Hispana kortego.

La feliĉa okazaĵo, senpacience atendita de Hispanujo, okazis la 10-an de Majo je la duono posttagmeze. La junā reĝino Victoria naskis filon, heredonton de l' trono. Ĉiuj deziroj de reĝo Alfonso, de la reĝa familio, de l' hispana popolo estas plenumitaj. La ĝojiga sciigo instigis en la mondo elmontron de unuanima simpatio. Ni ree esprimas la nian al niaj hispanaj samideanoj.

« TRA LA MONDO ».

Monumento al Casimir Péret.

La 24^{an} de Marto oni inaŭguraciis en Béziers sur la placo de la Revolucio — kie la 4^{an} de decembro 1851 tiom da kuraĝegaj demokratoj falis sub la kugloj de l' soldatoj — majestatan monumenton ŝulditan al la ĉizilo de l' genia skulptisto Injalbert el Béziers kaj dediĉitan al la bravega proskrito ekzilito Casimir Péret.

Kondamnite je ĉiama ekzilo la 29^{an} tagon martan 1852, li sin forŝavis de Cayenne (Kajen) la 15^{an} de Oktobro 1855. La morgaŭan tagon, dum terura fulmotondro, la boato rompiĝis sur la insuleton de la Roche Blanche; kaj tiel pereis la malfeliĉega Casimir Péret, kies nomon oni donis al la Beziersa strato sur kiu li loĝadis.

JOHANINO FLOURENS.

Ĉirkaŭ la Tria Kongreso:

« Boks & Koks » estas la titolo de tre amuza komedio ludota dum la Kongreso, kaj kiun la Trio havis la bonegan ideon eldoni sufiĉe frue por ke oni povu ĝin aĉeti antaŭe.

Ĝi estas la plej ŝatata komedio de Johano Maddison Morton, fama pro lia humora talento. La komedio estas inda je la reputacio de sia aŭtoro, kaj certe la prezentado estos nur longa ridegado. Ni gratulas la Trion pro ĝia elekto, kaj konsilas la akiron de tiu ĝojiga volumo (70 c. afr. ĉe La Tria Kongreso, 13, Arundel street Strand, London, W. C., 80 c. ĉe Tra la Mondo.)

Nia fervora samideanino, Fino Ad. Schafer (8, Gloucester Crescent, Regents Park, London, N. W.), favore konata, per niaj kongresoj, kiel nemetiista aktorino, organizas teatran prezentadon por la postkongresaj tagoj pasigitaj en Londono. Tiuj, kiuj dezirus kanti aŭ deklami tiuj sendu al la supra adreso siajn proponojn, por ke oni povu aranĝi belan internacian programon.

Londona gvidlibro. — Niaj Londonaj amikoj preparas ankaŭ Londonan 48-paĝan gvidlibreton konigantan la vidindaĵojn, kaj enhavantan praktikajn informojn pri la stacidomoj, moneroj, k. c. stratakarton, k. t. p. Ĝi kostos 70 cm. (75 cm. afr.)

Ni pagigos ĝin nur 60 c. al niaj abonintoj (poŝtmarke), tiamaniere ke, kun la kosto de la menda poŝtmarko (25 cm.) ili ne pagos ĝin plikare ol la fiksita prezo (85 cm.). Tiel ili povos ĝin aĉeti sen plua elspezo kaj studadi antaŭe. Ni konsilas ke oni ĝin mendu, renovigante sian abonon.

NOVAJ ESPERANTAJ GAZETOI.

Mi havas la plezuron saluti du novajn naci-propagandajn kunfrotajn:

SOLVOJ DE L' PROBLEMOJ (3^a KVARONJARO).

PROBLEMO 13 ^a	koko — kokso — kokoso
» 14 ^a	tilio — lilio — milio
» 15 ^a	pizo — piro — pipro
» 16 ^a	la frazo estas sur la kovrilo de « Tra la Mondo » kiu prezentas desegnaĵon de Pillet.
» 17 ^a	C O L O P I L I T

PROBLEMO 18^a La ĉasosteliston oni vidas kiam oni renversas la bildon, iom klinitan dekstre, la genuo en muro de la domo, brako kaj mano en branĉo, la kapo inter du larĝaj folioj de kreskaĵo kaj unu el tiuj folioj iĝas ĉapelo; la linio de l' dorso estas linio kiu montras la vojeton al domo.

PROBLEMO 19^a rusto kiu manĝas la feron; mi akceptis ankaŭ: vermo.

PROBLEMO 20 ^a	tornistro — tornisto
» 21 ^a	hirudo — hirundo
» 22 ^a	paltoj — talpoj
» 23 ^a	K o k o j o p a n k a j o n j

« Bulgara Esperantisto », atendita de kelke da tempo, alportis al ni bonegajn sciigojn pri la movado en Bulgarujo. Fiere povas skribi niaj amikoj: « Bulgarujo kiu pacience eltenis sian purecon sub turkregado kvincentjara, videble marŝas antaŭ la aliaj landoj de duoninsulo Balkana ».

« Bulgara Esperantisto » estas speciale propaganda, t. e. bulgare presita, kaj deziras resti tiel, ne uzante por literaturo spacon pli bone utiligitan por pura propagando bulgara.

En sia interesa artikolo pri Rio de Janeiro, nia distinginda samideano E. Backheuser montris kiel, en kelkaj jaroj, estis tute renovigata la ĉefurbo de Brazilujo.

La saman praktikan agemon kiel la inĝenieroj montras niaj brazilaj samideanoj, kiuj, de nun, havas sian propagandan organon, kaj sukcesis starigi kuman planon por sia estonta agado.

La gazeto « Brazila Revuo Esperantista » havas bonegan aspekton kaj enhavas valorajn sciigojn pri la propagando kaj la nuna stato de Esperanto en Brazilujo. Jam fervore agadas la Brazila Klubo « Esperanto »; la Suda Stelaro, la unua fondita, de S^{ro} Keating; Esperanta Societo Sud-Rio-Grande, kies sek. estas nia agema samideano Fred. Geyer; Laboristara Esperantista Grupo kaj Verda Stelo.

Kiel ni jam anoncis, dank' al la penadoj de S^{ro} Medeiros e Albuquerque, deputato, prez. de Brazila klubo, Esperanto estas akceptita kiel klara lingvo, t. e. malkoste, kiel telegrafa lingvo. Ĝis nun sama akcepto estas ne permesita aŭ eĉ rifuzita en la aliaj landoj.

« Brazila Revuo Esperantista » instigas por fondo de konsulejoj kaj oficejoj en Brazilujo, kie jam ekzistas 2 konsuloj: S^{roj} Backheuser (Escola Polytechnica) kaj Raymundo Cantão (r. dos Ourives 107). Ĝi enhavas sciigojn pri konkurso dediĉita al la Brazilujo, kun teksto, tradukota Esperanten., de la fama brazila aŭtoro Coelho Netto, kies verkon ni enpresas hodiaŭ.

Fine ĝi sciigas nin pri grava kongreso okazonta de la 12^a ĝis 19^a de Julio, laŭ plano bonega, kaj pri la estonta agado, ankaŭ lerte preparota de kompetentaj komisioj.

Certe niaj brazilaj amikoj faros rapidan kaj bonegan laboron kaj ni ĝojas pri la apero de « Brazila Revuo Esperantista » kiu kunigos la ĝis nun senligajn agadojn.

La redakcio konsistas el 3 bonfamaj samideanoj Alberto Alvares F. Vieira; Reynaldo F. Geyer; Everardo Backheuser. Por ĉio, kio koncernas la gazeton, oni sin turnu al « Brazila Revuo Esperantista », Rua da Assembléa, 46, Rio de Janeiro, Brazilujo. La nomaro de la agentoj aperos en la venonta numero. De nun, oni sciigas ke « Ekster Brazilujo, oni abonas je Brazila Revuo Esperantista ĉe Tra la Mondo »: 6 fr. jare.

Ĝis ni ricevis 2 numerojn de « Finna Esperantisto », kiu « aperos en la modesta formo de mimeografiita folieto » ĝis kiam la sindonaj eldonistoj ricevos sufiĉe da abonantoj por presigi la gazeton. Ni deziras kore, ke tiu presigo estu baldaŭ ebla.

De nun, la eldonado de la « Ĉefeĉ » aj ŝlosiloj estas komisiita al komitato, kies sekretario estas S^{ro} E. L. Kearney. Ni detale parolos pri tiu ŝanĝo. Estonte oni siu turnu al Internacia Esperantista Propagandejo, Merton Abbey, London, S. W.

DIVENIS: (la ciferoj metitaj post la nomoj rilatas la numerojn de la solvitaj problemoj).

Boitard	13	15	17	18	19	20			
F ^{ro} Allin	13	14	15		18	19			23
Wieslander	13	14	15	17	18				
Wichert	13	14	15	16	17	18		20	
Malnovulo	13	14	15	16	17	18		20	21 22 23
Letenneur	13	14	15	17	18			20	21 23
L. Holt		14			17	18			
Warden	13	14	15	16	17	18	19	20	23
Samideanino	13				17	18			
Sabadell									21 23
Karolino									21 22 23

Klasigo por la tria kvaronjaro kaj premioj:

Malnovulo	2 kvaronjaraj abonantoj al T. I. M. kaj « Unua Ĉapitro de miaj memorskriboj ».
Warden	1 kvaronjara abono al T. I. M. 3 malnovaj numeroj sinsekvaj kaj « Unua Ĉapitro de miaj memorskriboj ».
Letenneur	3 malnovaj numeroj sinsekvaj kaj « Unua Ĉapitro de miaj memorskriboj ».
Wichert	3 malnovaj numeroj sinsekvaj.

Ĉiuj gajnintoj estas petataj diri al mi kion oni devas fari pri aŭ per la gajnaĵoj.

CH. BRUNET,

9, Cours Victor Hugo, Bordeaux.

Vidu la Regularon de niaj konkursoj en la antaŭa n^o.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

Ni akceptas nenian respondecon pro la nericevo de la gazetoj. Tiukaze, oni sin turnu senpere al la administracioj.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Eho Esperantista. — Praktika kaj komerca. Ĉe S^o H. Brihl, Unter den Linden 47 III, Berlin, Deutschland. Jare, 2 markoj.

Eksport Ĵurnalo. — Internacia Revuo por komerco, Industrio kaj Tekniko. — Jare 5 fr. (3 markoj Germanuje). — Ĉe Esperanto Verlags-Anstalt Emil Schnell, G. m. b. H. Frankfurt a. M. Germanujo.

Esperanta Ligilo. — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — Ĉe S^o Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

Esperanto. — Duonmonata, Internacia. Vidu la specialan anoncon.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu N^o afrankita 0f. 50; Francuje, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 frankoj. Sin turni al S^o Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

Foto-Revuo Internacia. — Vidu la specialan anoncon.

Idealo. — Organo de « Sicilia Federacio Esperanta ». Italuje, 2 fr. alilande, 3 fr. Corso Catalafimi, 495 Palermo (Italujo).

Juna Esperantisto. — Vidu la specialan anoncon.

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K^o, 79 Boulevard St-Germain, Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7.

Lingvo Internacia. — Vidu la specialan anoncon.

Socia internacia Revuo. — Internacia redaktata pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

The American Esperanto Journal. — Oficiala organo monata de la « American Association ». Angle kaj Esperante. Propagando kaj literaturo. — Jare 5 fr. Boulevard station, Boston, Mass. (U. S. A.)

Amerika Esperantisto. — Gazeto por la Lingvo Esperanto en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko, angle kaj Esperante. Bele presata. Jara abono: 1 dolaro. Adreso: L'Amerika Esperantisto, Oklahoma City, U. S. A.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonoro. — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. jare. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique). La abono komencas nepre la 1^{an} de Septembro.

The British Esperantist. — Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 20 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj da literaturo tute en Esperanto. Jare 4 fr. — Ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

Brazilo Revuo Esperantista. — Portugale kaj Esperante. 6 fr. jare. — Ĉe la administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro, aŭ ĉe « Tra la Mondo ».

Bulgara Esperantisto. — 1 fr. 50, Sofio, Bulgarujo.

Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. — Adm. kaj Red.: Praha II — 313 — Karlovo namesti.

Centrameriko Esperantista. — Hispane kaj Esperante. F. R. G. Abrill, 8^a Avenida Sur 11, Canton Libertad, Guatemala, Ameriko.

L'Espérantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francuje 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare; aparta N^o: 35 cent.

Esperanto. — Hungare kaj Esperante. Scienca kaj literatura. 4 fr. ĉiulande. Ĉe S^o Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV.

Germana Esperantisto. — Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate) Redaktata germane kaj Esperante. JARABONO, 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

Helpa Lingvo. — Dane kaj Esperante. Abono 1,20 kron. Admin. ĉe F^{ino} G. Mönster, Osterbrogade 54 B, Kopenhago O., Danujo.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, — kun ilustraĵoj. Jarabono 2 fr. 60 — N^o 1^a, 3 ĉome, Jurakō, Kozimacik, Tokio.

La Pioniro. — Ĵurnalo Esperanta India. Eldonata de la Kolar Gold Field Esperanto Club. Monata abono: kvar pencoj. Red. kaj Adm.: Hon^a Sek^o de la klubo esperantista de la K. G. F. Marikuppam, Mysore State, South India.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 2 fr. Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

Ruslanda Esperantisto. — Ĉiumonata organo de la S-to «Ĝespero». — Jara abono 8 fr.: Ruslando, St Peterburgo, B. Podjaĉeskaja, 24, al la S^{to} «Ĝespero.»

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. Administracio kaj redakcio: Avelanas, 11, presejo — Valencia (Spana).

Svisa Esper. — France kaj Esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEMAJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

Le Cycliste. — Revuo monata de ciklotekniko kaj de turismo. — D^{ro}: P. de Vivie, 5, Rue de la Préfecture, Saint-Etienne. — Abono: Francuje 1 fr. 80, alilande 2 fr. 40. — Ĉiuj informoj pri la bicikloj kun mekanismo por ŝanĝi la rapidumojn kaj pri higieneco ciklista.

De Lushof. — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj.
Sin turni al la presisto de Tra la Mondo, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimemon.

Il Cittadino Italiano. — Itala familia gazeto, Via della Posta, 16. Udine.

Tous les Sports. — Oficiala Gazeto de l' Unuigantaro de la Societoj Francaj de Sportoj Atletaj (100,000 anojn) D^{ro} Raoul Fabens, 29, Rue N.-D. de Nazareth, Paris. — Konstanta rubriko en Esperanto de ĉiulandoj kunlaborantoj. Jarabono: Paris 9 fr.; Dep. 10 fr.; Alil. 12 fr. — Por U. S. F. S. anoj jare: Paris 5 fr.; Dep. 6 fr.; alil. 8 fr. — Unu numero 0.15 en francaj stacidomoj. Petu specimemon.

Nekomercaj anoncetoj.

1 fr. 25 po 4 linioj 33-literaj. Ĉiu plua linio: 25 c.

36. S^{ro} Sam H. Carter, 62, Walker St., Dunedin Nova Zelando, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn (urbaj vidoj) skribitajn Esperante, france, itale, germane aŭ hispane, kaj ankoraŭ sendos p. k. por gazetoj de tiuj lingvoj.

37. S^{ro} L. Rigoir sciigas siajn korespond., ke li loĝas nun en Marseille, 26 rue du Progrès.

38. S^{ro} L. de Guesnet, loĝas nun 5, Rue Chomel, Paris VII. Sin turni al li por ĉiuj sportaj aferoj. Ni rememorigas, ke S^{ro} L. de Guesnet verkas Esperantan kronikon en la grava gazeto « Tous les Sports », kaj ke informoj pri la ĉiunaciaj sportaĵoj estos bonega propagando por Esperanto.

S^{ro} Ŝulgin. — Koran dankon pro nova sendaĵo.

S^{ro} V. Ostanieviĉ. — Pro manko de specialaj konoj pri la tutmondaj skribmanieroj mi ne povas opinii pri via projekto. — Ni ne havas vendan kontoron sed trassendas nur, laŭokaze, la mendojn.

Leŭt^o Populus. — Dankon pro via amuza sendaĵo.

S^{ro} Vl. Tabinski. — Bonvolu precizigi kiajn numerojn vi deziras duoble?

S^{ro} E. Bobrowski. — La jarlibro por 1907 ne jam aperis; la prezo estos 3 fr. 50 c.

S^{ro} Sampa Luoma. — Nun mi ne plu bezonas fot. por la enketo. Antaŭan dankon pro la esperigitaj!

Esperantistaj ilustritaj Poŝtkartoj.

Dek malsimilaj vidaĵoj de la fama Fabrikejoj Schneider, ĉe « Le Creusot » kun Esperanta teksto. Ĉiu ekzemplero: 10 c.

Sendu la mendojn al « Esperantista konsulejo », 20, Place Schneider. Le Creusot [Francujo].

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.
A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.